Martinus Institut

N-ro 1 - 2021

# Kosmos

## La Kosmologio de Martinus

**Ole Therkelsen:**
La 100-jara naskiĝtago de nia Afero

**Martinus:**
Pensoj ĉe la jarŝanĝo


**Martinus:**
La venonta perfekta homregno

**Martinus:**
Mencioj de Esperanto en Granda Kurso

**Konsilio de la Instituto:**
Esperanto kiel oficiala internacia lingvo de Martinus Instituto

**Ole Therkelsen:**
Finevoluinta kaj perfekta internacia lingvo

**Demando kaj respondo**



© Martinus Institut 1981 Reg. 26

*La venonta perfekta homregno*

Esperanto

# Martinus pri Esperanto en Kosmos 1939



*En la jaro 1932 fondiĝis la Martinus-Instituo per la eldono de la unua volumo de Livets Bog (La Libro de la Vivo). En la jaro 1933 eldoniĝis Kosmos, la revuo de la Martinus-Instituto. Jam en Kosmos n-ro 1, 1939 Martinus skribis pri Esperanto en dana lingvo.*

"Kiel la legantoj eble jam vidis, la revuo Kosmos enhavas kolumnon kun teksto en la internacia komuna lingvo "Esperanto". Ĉar multaj danoj uzas tiun lingvon kaj havas vastajn kunligojn kun esperantistoj en diversaj landoj, ni tiel malfermas fenestron al la granda mondo.

Por ne malfavori tiujn, kiuj ne komprenas Esperanton, la artikolo ankaŭ aperas en la revuo en dana lingvo. Ambaŭ versioj aperas en la revuo tiel, ke sendamaĝe por aliaj tekstoj oni povas eltondi la artikolon por sendi ĝin al fremdaj esperantistoj.

Esperanto estas planita lingvo, konstruita de la pola kuracisto L. Zamenhof (1859-1917), kiu publikigis la lingvon sub la kaŝnomo Dr. Esperanto (esperanta homo) por tiel krei internacian helplingvon. Rilate al aliaj similaj lingvoj Esperanto senkonteste havas grandajn avantaĝojn, kaj ŝajne estas la sola planita lingvo, kiu pruvis sian taŭgecon (i.a. en diversaj kongresoj).

Esperanto forte evoluadis, sed iom stagnis dum la unua mondmilito. Sed nun ĝi denove forte evoluas, kaj certe pro sia granda simpleco kaj facileco ĝi certe gajnos grandan lokon en la internacia evoluo.

En tia internacia laboro, kiu prezentiĝas pere de "Livets Bog" kaj la revuo "Kosmos", Esperanto ŝajne povas esti de grandega uzo kiel portempa ponto inter la dana lingvo kaj la fremdaj lingvoj, kiu estas parolita de eksterlandaj interesatoj de mia laboro. Pere de Esperanto multe da interesatoj tra la mondo senprokaste povos kontaktiĝi kun mia laboro, ĉar ili ne bezonas atendi la estontan tradukon en la grandajn mondlingvojn.

Esperanto tiel estas ponto inter la dana kaj ĉiuj fremdaj lingvoj. La ĉino kaj ruso, la hindo kaj japano, same kiel ĉiu unuopa eŭropano pere de Esperanto same facile trovos vojon al kompreno al tio, kion ni deziras skribi al ili en nia revuo. Tio tiel estas la unua eta klopodo serĉi atenton dise en la granda mondo.


Per tio komenciĝis nova suplemento al nia internacia laboro. Se la intereso estas sufiĉe granda, ni starigos Esperanto-kurson en la kadroj de la instituto. Povos signifi treege multe por la disvastigo de mia verko, se kiel eble plej multaj de ĝiaj amikoj lernos Esperanton." (*Kosmos* n-ro 1/1939, p. 1-2).

Traduko Ole Therkelsen

**Martinus pri internacia mondlingvo:** Bonvolu vidi paĝon 25, par. 25 "Internacia mondlingvo"

# La 100-jara naskiĝtago de nia Afero

de Ole Therkelsen



*Martinus iniciĝis kaj ricevis kosman konscion la 24-an de marto 1921, kaj tiun tagon li nomis la naskiĝtagon de la Afero. Martinus opinias, ke lia persono ne gravas, kaj pro tio oni estontece ne festenos lian naskiĝtagon, sed tiun de la Afero aŭ la misio.*

**1. Fabelo el la reala vivo**

Retroen-rigardante tra la jarmiloj, ni vidas ke fojfoje naskiĝas tute eksterordinara geniulo. Laŭ mia opinio, sur ĉi tiu bela blua planedo, nin vizitis morala geniulo en la formo de la mondrenoviganto Martinus (1890-1981).

La 11-an de aŭgusto 1890, Martinus Thomsen naskiĝis ekster geedzeco en Sindal en Norda Jutlando, kie li pasigis sian infanaĝon kaj la unuan parton de sia junaĝo. Unue li trovis laboron ĉe bienoj, kaj poste li edukiĝis kiel laktaĵisto. Poste li laboris ĉe laktaĵejoj diversloke en la provinco, ĝis sia transloĝiĝo al Kopenhago, kie li 30-jara travivis grandan konscivastiĝon.

Dum sia tuta vivo, Martinus vivis tre simple kaj ŝpareme, kaj dum la daŭro de sia vivo, li ne altiris iun konsiderindan publikan atenton.

En la pasko en marto 1921 Martinus trapasis tion, kion li mem nomis "la granda naskiĝo", per kiu li ekhavis "kosman konscion". Tiu naskiĝo aŭ iniciĝo, kiu daŭris kelkajn tagojn, verŝajne ne estus havinta iun konsiderindan signifon, se ĝi ne estus postlasinta Martinus en nova konscistato kun permanentaj intuiciaj aŭ kosmaj sensokapabloj. Per tiuj novaj sensokapabloj li ekhavis aliron al nova mondo, kaj li, se tiel diri, naskiĝis en pli altan mondon. Juĝante laŭ la scienco de amo, kiun li poste kreis, tiu mondo estis lia reala kaj natura hejmloko. Ŝajnas al mi, ke ni en nia tempo sur la tero havis viziton de gasto el pli alta mondo.



Martinus 1921

**2. La fono de la verkisteco de Martinus**

En *Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio* kaj *Livets Bog* Martinus rakontas, ke la aktiviga fono por lia tuta verkisteco estis la profunda konsciŝanĝo, kiu okazis en marto 1921, dum kiu li travivis "la blankan fajrobapton" kaj "la oran fajrobapton".

Martinus: "La kosma fajrobapto, kiun mi trapasis, kaj kies detalan analizon mi ne povas trakti ĉi tie, do postlasis tiun fakton, ke en mi estis aktivigitaj tute novaj perceptokapabloj. Tiuj kapabloj ebligis al mi – ne en ekbriloj – sed male en konstanta maldorma stato de tagokonscio – vidi malantaŭ la fizika mondo ĉiujn portantajn spiritajn fortojn, nevideblajn kaŭzojn, eternajn mondleĝojn, bazajn energiojn kaj bazajn principojn. La mistero de la vivo sekve ne estis mistero por mi. Mi fariĝis konscia pri la vivo de la universo kaj estis inicita en la dian kreoprincipon." (Livets Bog, vol. 1 § 21).

Post la menciita fajrobapto Martinus sekve ekhavis novajn kapablojn, kiuj ebligis al li enrigardi la eternon kaj senfinon mem. La 24-an de marto 1921 Martinus ekhavis permanentan kosman konscion.

Martinus: "Mi vidis, ke mi estas senmorta estulo, kaj ke ĉiuj aliaj estuloj en la vivo estas eternaj realaĵoj havantaj, same kiel mi mem, senfinan ĉenon de antaŭe travivitaj vivoj malantaŭ si. Mi vidis, ke ni ĉiuj estas evoluintaj de malaltaj, primitivaj formoj de vivo al nia nuna stadio, ke tio estas nur provizora stadio en tiu evoluskalo, kaj ke tiel ni survojas antaŭen al gigante altaj formoj de vivsferoj en la foro. Mi vidis, ke la universo estas ununura granda viva estulo, en kiu ĉiuj aliaj estuloj unuope estas organoj, kaj ke ĉiuj ni homoj, bestoj, plantoj kaj mineraloj estas unu familio, estas, metafore dirite, el samaj karno kaj sango." (Livets Bog, vol. 1 § 21).

En la sekvaj 60 jaroj de sia vivo, li verkis, dank' al siaj kosmaj kapabloj, verkaron je proksimume 9000 paĝoj, tiel kreante tute novan spiritan sciencon kaj tute novan mondbildon – *La Eterna Mondbildo*. En sia sepvoluma ĉefverko *Livets Bog*, kiu ampleksas preskaŭ 3000 paĝojn, Martinus en unu loko uzas la esprimon "la eterna saĝo" pri sia verko. (Livets Bog, vol. 1 § 7).

### 3. La meditado kiu aktivigis la konscivastiĝon

En 1921, Martinus laboris en la oficejo de la laktaĵejo "Enigheden", kie li aŭdis pri nova interesa libro kun spiritaj temoj, kiun legis unu el liaj kolegoj. Kiam Martinus certiĝis, ke tiuj novaj spiritaj direktoj ankaŭ rilatis al preĝado, li ekinteresiĝis prunti la libron, kaj iun tagon en februaro 1921, li estis invitita al la hejmo de la persono kiu posedis la libron, Lars Peter Larsen (1879-1948), kiu poste ŝanĝis sian nomon al Lars Nibelvang.

Martinus mem rakontis ke li ne havis okazon legi la libron ĝisfine, kaj ke la sola kion li memoras de la legata peceto, estas ke ĝi instigis lin mediti je Dio. Kiam Martinus dek jarojn poste komencis verki siajn librojn, li memoris nek la titolon nek la verkinton de la libro, pro la forta efiko de la granda spirita travivaĵo al lia cerbo.

Post la granda konscivastiĝo Martinus tute ne kapalis legi pro psikaj kialoj.

Martinus: "La nura imago legi en libro sufiĉis por igi min senti, kvazaŭ mia cerbo krevos. Kaj en la periodo, kiam mi trapasis la menciitan spiritan proceson, ĝis mi komplete trarigardis la tutan mondbildon kaj manifestis ĝin en bilda formo, mi do ne legis en iu ajn libro kaj ne estis en kontakto kun iu ajn alia formo de teoria gvido. Tiel same antaŭ la vekiĝo de miaj kosmaj kapabloj mi estas karakterizebla kiel viro tute sen studoj. Mi nome neniam studis, sed ricevis nur la ordinaran vilaĝlernejan instruadon, kiu por mi, kiu naskiĝis en la kamparo, ampleksis nur tri horojn dufoje semajne en la somero kaj iom pli en la vintro." (Livets Bog, vol. 1 § 22).

Martinus poste legis nek teozofiajn nek antropozofiajn librojn. Tial estas erare, kiam oni en aliaj verkoj asertas, ke Martinus sin apogis sur la teozofio aŭ la antropozofio, dum la kreado de sia mondbildo. En la lernejo, Martinus tre ŝatis biblian historion, sed li forte emfazis, ke li ne ekhavis sian scion per legado aŭ studado. (Libreto 12B – *La vojo al iniciĝo*, ĉap. 25).

Martinus diris: "Ne malmultaj diris al mi ke certe mi multe legis kaj studis, sed tiel ne estas. Mi estas vivanta pruvo ke oni povas veni al la plej alta scio pere de sia propra konscio, kaj tio estas

stato al kiu ĉiuj homoj survojas." (Kosmos n-ro 3, 1991).



La kanseĝo en kiu Martinus meditis. Eblas vidi la seĝon en la muzeo "Martinus Mindestuer" (Memorsalonoj de Martinus).

**4. La kristovizio kaj "la blanka fajrobapto"**

Lars Nibelvang notis en siaj taglibraj folioj, ke li estis doninta al Martinus parolajn instrukciojn pri kiel oni povas mediti sidante en komforta seĝo kaj eventuale surmeti okulbendon por ŝirmi sin kontraŭ lumo kaj tiel pli bone povi koncentriĝi. Post tio Martinus tiucele aĉetis kanfotelon, kaj li rakontis ke ĝi estis tre viva, tute magneta kaj ke ĝi konstante knaris. (Kosmos n-ro 3, 1991).

Martinus loĝis en malgranda apartamento en Jagtvej 52A[1.tv.] en Kopenhago, kiam li iun vesperon dum la pasko en sia kanfotelo travivis la blankan fajrobapton, kiu estis vizio de Kristo.

Dum tiu ĉi koncentriĝo je Dio, Martinus en tagkonscia kosma vizio travivis sian alvokiĝon por krei la kosman sciencon, kiu logike kaj intelekte klarigu tiun "multon", kiun Jesuo ne povis klarigi al la disĉiploj, ĉar ili tion ne povintus elteni. (*La intelektigita kristanismo*, Antaŭparolo kaj § 2).

Martinus estis sidinta ne tre longe, kiam li vidis lumantan punkton en la foro, kaj subite aperis kristofiguro. Estis la skulptaĵo farita de la dana skulptisto Bertel Thorvaldsen, kiu bildigas Kriston kiam li diras: "Venu al mi" (La katedralo de Kopenhago). – La figuro estis malgranda kaj staris iom for. Mallumiĝis, kaj kiam revenis la lumo, la figuro aperis viva kaj en natura homa grando. Ĝi estis vestita per vesto el brilaj steletoj, preskaŭ kiel mantelo el diamantoj. Ĝi estis treege brila, la lumo estis neĝe blanka, kaj la ombroj bluaj. Tiu Kristo-estulo el blindiga sunlumo tute kviete alproksimiĝis al Martinus, kiu sidis kvazaŭ paralizita en sia kanfotelo. Li rigardis rekte en estulon el fajro, kiu konsistis el malgrandaj brilaj punktoj, similaj al la fajreroj de stelŝprucilo, nur pli malgrandaj. Fine la figuro venis rekte en la korpon de Martinus, en lian internon. Ĉi tie ĝi haltis kaj restis staranta. Mirinda alta sento lin kaptis, kaj la paralizo estis for. La dia lumo kiu tiel estis ekloĝinta ene de Martinus, donis al li kapablon panorame rigardi la mondon. De la dia figuro ene de Martinus eliris enorma lumradio, kaj en tiu lumo Martinus povis vidi la terglobon turniĝi. Li vidis kontinentojn kaj marojn, urbojn kaj landojn, montojn kaj valojn baniĝi en la lumo el lia propra interno. En la blanka lumo, la tero transformiĝis al Regno de Dio. Kaj per tio la supertera dia kristovizio finiĝis. (*La intelektigita kristanismo*, § 2; Libreto n-ro 4 – *Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio*, ĉap. 16).

**5. La alvokiĝo de Martinus por fariĝi mondinstruisto**

Post la Kristo-vizio, Martinus sentis sin alvokita fariĝi mondinstruisto. Kiam la Kristo-figuro eniris en lin, kaj li vidis la




La Kristo-skulptaĵo de Bertel Thorvaldsen (1770-1844). La katedralo de Kopenhago kaj la muzeo de Thorvaldsen.

lumon disradii sur la teron, li tion travivis kiel signon ke Kristo persone lin inicis por daŭrigi la kristomision. Tio ke la terglobo turniĝis en tiu lumo de Kristo, simbolis ke lia misio estis tutgloba.
Li sentis ke Dio lin estis elektinta por sciencigi kaj intelektigi la kristanismon kaj konduki ĝin al ties fina plenumiĝo ĉi tie sur la tero.

Martinus skribas: "Se dum la vizio estus tempo kaj eblo por tio, mi certe estus prezentinta kontraŭargumentojn, same kiel Moseo, kiam li per la vizio en la dia fajro de la dornarbusto estis alvokita por elkonduki la izraelidojn el Egiptio. Same kiel li sentis sin ne havi sufiĉajn kvalifikojn por plenumi tiun tre malfacilan mision, tiel ankaŭ mi kiel needukita persono sen ajna kosma scio, estus prezentinta kontraŭargumentojn rilate al nesufiĉaj kvalifikoj. Sed, kiel menciite, por tio ne estis tempo. Kaj cetere, tiaj pensospecoj ne estus esprimeblaj ĉi tie. Dum la sekvaj horoj mi estis tiel spirhaltige ensorbita en la dia supertera potenco, kiu per la vizioj faris min neŝanceleble konscia en tiu mia kosma alvokiĝo aŭ iniciĝo de mia vivo por la perfektigo de la kristanismo ĝis scienca aŭ neŝanceligeble logika vivfundamento por la finkreado de la homaro laŭ la bildo de Dio." (*La intelektigita kristanismo*, § 2).

**6. La travivaĵo de Martinus de la ora fajrobapto**

Antaŭtagmeze la tagon post la Kristovizio, Martinus travivis la oran fajrobapton, kiu estis universala travivaĵo de la universo aŭ la konscio de Dio. Li sidiĝis komforte en sia kanfotelo, kaj refoje li rapide estis envolvita en dia lumo. Ĉielo ekvideblis, kiu estis el tiel abunda blindiga ora lumo kaj el tiel rapide vibranta materio, ke li sentis, ke li troviĝas je la maksimumo de tio, kion lia organismo kaj konscio povus elteni. Li troviĝis en maro da lumo, kiu ĉi-foje ne estis el la blanko de neĝo, sed nun ĉio estis orkolora. Tra la tuto vibris fajnaj oraj fadenoj, kiuj trembrilis kaj rebrilis ĉiuloke. Li sentis, ke tio estas la konscio aŭ propra pensosfero de Dio. Jen la fonto de la ĉioamo mem. (Libreto n-ro 4, *Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio*, ĉap. 17).

La ora aŭro kunigas la konsciojn de ĉiuj vivaj estuloj en unu komunan konscioceanon kiu konsistigas nenion malpli ol la konscion de Dio mem. Al Martinus ĝi aperis kiel miloj da vibrantaj oraj fadenoj, kiuj tute plenigis la spacon. En tiu ĉi ora aŭro li spertis esti en la hejmloko de sia eterna mio, havante ekziston ekster ĉio, kio alie estas videbla kiel kreitaj fenomenoj. Li troviĝis ekstere de tempo kaj spaco, estis unu kun la senfino kaj eterno. La spaco nur percepteblis kiel lumoceano, trabrilita de orkolora lumo. En tiu lumoceano el trembrilaj

oraj fadenoj, senteblas nur unu sento, nome la sento esti unu kun Dio kaj unu kun ĉiuj aliaj vivaj estuloj en la universo. Ĉi tie oni troviĝas ĉe la panoramejo de Dio mem, onia menso kunfandiĝas kun la menso de la universo. Oni fariĝas unu kun la kosmo. (*La intelektigita kristanismo*, § 3, 6 kaj 11).

**7. Sciencigita kristanismo**

Martinus ne nur rigardis sian verkon spirita sciencо, kosmologio, aŭ eterna mondbildo, sed li ankaŭ opiniis ke ĝi estas sciencigita aŭ intelektigita kristanismo.

La kristanismo en sia komenca stadio ja estis religio, sed laŭ Martinus ĝi fariĝos scienco, eĉ la mondscienco mem, kiu kunigos la tutan mondon. Ĝi unuigos religion kun scienco, koron kun cerbo kaj la orientan pensadon kun la okcidenta. Kiam la eternaj analizoj eniros en la kristanismon, oni vidos ke la tuto kongruas kun la amo kaj la senfineco, kaj tiam la kristanismo fariĝos scienco kaj ĉesos esti kredo, Martinus opiniis.

Tiu scienco de amo elmontros ke ĉio en sia fina rezulto konfirmas la bibliajn vortojn "ĉio estas tre bona". Martinus do opinias, ke estas ĝuste, kiam oni en la biblio post la kreado de la mondotuto lasas Dion diri: "Vidu, ĉio estas tre bona".

Martinus rilatigas sian verkaron al la du pli fruaj testamentoj en la biblio donante al sia spirita scienco kiel tuto la titolon La Tria Testamento, ĉar li rigardis sian laboron kiel daŭrigon de la "kristomisio". Martinus indikis ke lia verko La Tria Testamento estis identa kun la intelektigita, senmorta kristanismo, kiu fariĝos la vivfundamento de la homaro kaj la fundamento de la nova mondmoralo.

Martinus havis la opinion, ke tiu nova spirita scienco estas la "Spirito de la vero", aŭ "la Parakleto, la Sankta Spirito", kiu venos laŭ la antaŭdiro de Kristo rilate al la venonta vivrenovigo fare de la kristanismo:

"Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi." (Joh. 14:26).

"Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti. Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron; ĉar li parolos ne de si mem; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos; kaj li anoncos al vi venontajn aferojn. Li gloros min, ĉar li ricevos el miaj kaj anoncos al vi. Ĉio ajn, kion la Patro havas, estas mia; tial mi diris, ke li ricevos el miaj kaj anoncos al vi." (Joh. 16:12-15).

**8. La sola bezonaĵo kaj la daŭra paco sur la tero**

Kio do estas la celo de la laboro de Martinus? – Unu el la respondoj oni povas



Kristo kun la dana flago. La dana flago estas uzata en la ortodoksa eklezio kiel simbolo de la releviĝo de Kristo. La katedralo de St. Isaac en Sankt-Peterburgo.

trovi en la “antaŭparolo” de la unua libro, kiun Martinus eldonis en 1932, nome la unua volumo de la ĉefverko *Livets Bog en sep volumoj*.

Ĉar la teraj homoj ne havas inter si la samajn spertojn kaj scion, ili troviĝas en malsamaj ŝtupoj en sia evoluo de la mallumo al la lumo. Sed je certa ŝtupo en tiu evoluo fariĝas neeviteble akiri absolute veran konon pri la senco de la vivo, pri la plej profundaj leĝoj kaj eternaj bazaj principoj de la vivo, por povi atingi la absolutan feliĉon aŭ la perfektan sorton. Por tera homo kiu ankoraŭ ne estas kosme konscia, la akiro de tia kono do fakte estas “la absolute ununura neceso”. (Livets Bog, vol. 1 § 6).

Per sia kosma konscio, Martinus estis mem travivinta tiujn eternajn leĝojn kaj principojn de la vivo, kaj per tiu sia senpera scio pri la vero aŭ la eterna saĝo, li sentis devon fari tiun scion alirebla je la utilo kaj ĝojo de la publiko. La tuta verko de Martinus sekve estas rezulto de devosento. (Livets Bog, vol. 1 § 7).

Same kiel oni uzas geografiajn mapojn por faciligi la studadon de geografio en la lernejo, Martinus faris simbolojn por faciligi al la publiko studi la kosmologion. La fundamenta bazo por la kreiĝo de la tiel longe sopirata “daŭra paco” sur la tero, laŭ Martinus ĝuste estas la rezulto de la studo kaj komprenо de la kosmaj analizoj disvastigitaj al la homamasoj. (Livets Bog, vol. 1 § 8).

### 9. Martinus kaj la nova mondmoralo

Rilate al sia prelega aktiveco kaj la laboro kadre de Martinus-Instituto en Kopenhago kaj Martinus-Centro en Klint Martinus ofte aŭdis la demandon: Pri kio vi fakte laboras? – Dum prelego en junio 1975 li respondis tre mallonge kaj klare: “Efektive la definitiva respondo estas, ke tio estas mondmoralo. Jes, temas pri la mondmoralo mem”. (Kosmos nr 7, 2004).

Martinus do laboris pri la mondmoralo mem, kiu baziĝas sur la absoluta vero kaj la absoluta ĉioamo. El pure akademia aŭ filozofia vidpunkto povas esti tre interese studi la spiritan sciencon de Martinus, ĉar ĝi kontribuas al novaj kaj ĝis hodiaŭ ne konataj solvoj de multaj ekkonteoriaj kaj filozofiaj problemoj; sed lia laboro havas ankaŭ tute alispecan, praktikan celon, nome kontribui al la kreado de nova mondkulturo bazita je nova mondmoralo.

*Traduko Henning Sato von Rosen, 2010*



La gipsa kopio de Kristo en
la apartamento de Martinus

# Pensoj ĉe la jarŝanĝo

de Martinus

M2245



**1. Kion ni povas lerni de la jarciklo?**
La kristnasko donas okazon por agrablega, granda pensosfero, sed ankaŭ estas kaŭzo por agrablaj pensoj lige al la jarŝanĝo, kiu havas grandan kosman signifon. Ene de la jarciklo ni havas printempon, someron, aŭtunon kaj vintron, kaj post la paso de ĉiuj tiuj stadioj, komenciĝas nova jaro kun la samaj kvar principoj aŭ sezonoj, kaj tiel jaro sekvas jaron. Ĉi tie ni renkontas faktoron en la vivo, kiu iom post iom helpos homojn kompreni la tutan strukturon de la vivo. La tuta vivo estas regata de granda principo, kiu esprimas sin en cikloj, kiuj ampleksas tutan gamon ekde plej malgrandaj mikroskopaj formoj ĝis grandegaj makrokosmaj formoj. Per observado de ĉi tiuj cikloj ni povas atingi percepti la sencon de la vivo kaj la pozicion de la tuta homaro kaj la fundamentan moralon, al kies atingo la homo evoluas. Ni povas atingi kompreni nian propran sorton kaj travivi, ke la strukturo de la universo realigas la plej altan formon de justeco kaj amo.

**2. La kontrastoj de la ciklo**
Nun dum la jarŝanĝo ni deziras bonan novjaron unu al la alia, kaj tio ne estas sen kaŭzo. Tio havas multe pli grandan signifon ol ĝuste tio, ke estas nova jaro, kiun ni estos travivantaj. La evoluinta homo, kiu komencas montri intereson pri la senco de la vivo, kaj pri tio, kion montras al ni la ĉiutaga vivo, devas komenci per la jarŝanĝo aŭ la jarciklo. Ne sur la tuta teroglobola kvar sezonoj estas tre riĉaj je konstrastoj, sed sur niaj latitudoj, la sezonoj montras la plej grandajn kontrastojn, kaj per tio ili montriĝos granda parolo al ni, surbaze de kiu ni povas fari grandajn konkludojn. Nun ni havas vintron ĉi tie, kaj ni scias, ke post vintro venos printempo, somero, kaj post somero venos aŭtuno kaj vintro denove. Kvankam la homo nur rigardas ĉi tion kiel fizikan scion, tio estas scio pri kosmaj realaĵoj. Ekzistas multe pli da kosmaj realaĵoj ol ĉi tiuj kvar sezonoj, sed ili komencas efiki al la percepta kapablo de la homoj tiel, ke ili trejnas sin konscii pri kontrastoj kaj konatiĝas kun ili.

**3. La jara ciklo**
La principo de la vintro estas la principo de la morto; la vintro ankaŭ estas la tempo de mallumo, kun longaj noktoj kaj mallongaj tagoj, kun frosto kaj malvarmo, dum kiuj la vivo kuŝas en vintrodormado kaj estas en sia plej malgranda aktiviĝo. Dum la printempo la vivo vekiĝas kaj disvolviĝas, kaj venas pli da lumo kaj varmo. La vivo evoluas pluen al la somero, dum kiu ni havas plej multe da sunlumo, la plej longajn tagojn kaj la plej varman tempon de la jaro, dum kiu la vivo ege kreskas kaj aperas en sia plej granda aktiviĝo. Post tiu kulmino venas la aŭtuno, kiam la vivo denove malkreskas, la foliaro velkas, la tagoj mallongiĝas kaj fariĝas pli kaj pli malvarme. *La vintro* kaj la malvarmo denove regas, kaj la vivo denove ekdormas kaj estas en sia plej malgranda aktiviĝo.

Jen ni tamen rimarku, ke ĉe la polusoj estas permanenta vintro, kaj apud

la ekvatoro estas permanenta somero. Tie ni havas la plej malgrandan intelektan kaj vivperceptan evoluon; tie oni vivas pli emocian vivon. Ne estas en tiuj ĉi regionoj, ke aperas la grandaj sciencaj eltrovaĵoj kaj inventaĵoj, sed tio okazas en la pli aktiva parto de la mondo, kie ni havas la fortajn kontrastojn inter la sezonoj.

**4. La tagnokta ciklo**
Per la instruo de la naturo, la cikloprincipo en aparta grado enskribiĝas en nian memoron en la formo de la tagnokta ciklo. La principo de la vintro respondas al la noktomezo kun la mallumo kaj malvarmo, kie la vivo estas dormanta kaj en sia plej malgranda aktiviĝo. Jen venos la mateno, kiu estas la principo de la printempo; la vivo vekiĝas, la suno, la varmo kaj la lumo aperas. En la tagnokta ciklo la tagmezo egalas al la somera principo, kie la suno, la varmo kaj lumo kulminas. Post tio venos la vespero, kiu estas la samo kiel la aŭtuno, kie la vivo komencas malgrandiĝi kaj serĉi ripozon. Post tio ja venos nova noktomezo, nova kulmino de mallumo, kaj poste denove nova tago. Tion ni ĉiuj travivis abunde. 70-jara homo travivis tiun ciklon 25 550 fojojn.

**5. La ciklo de la homa vivo**
La vivo ekde naskiĝo ĝis morto montras la samajn kvar principojn. Komenciĝas per la infaneco, kiu respondas al la principo de la vintro. La malgranda infano estas kiel la floroj kaj la senfoliaj arboj en la arbaro dum la vintro, kiu havas la tutan vivfonton, la vivĝermon kaj eblojn por disvolviĝo en si. La infano kreskas al la juneco, dum kiu ĝi komencas sian disvolviĝon, ĝi ekhavas konscion, komencas pensi kaj povi partopreni en la funkcioj de la vivo. La juneco estas kiel la printempo, dum kiu la plantoj vekiĝas kaj disvolviĝas. Post tio, la estulo kreskas al la matureco, dum kiu ĝi havas sian plej grandan aktiviĝon, kio ja estas la sama principo kiel la somero. Tie la estulo kulminas en la matura stadio. Ĝi scias, kion ĝi volas kaj kion ĝi devas. Poste ĝi kreskas preter la kulminon, kaj la koncerna principo malgrandiĝas, kaj ĝi eniras la maljunecon. La hararo blankiĝas, la vidkapablo malboniĝas, la sensoj malfortiĝas tute kiel la foliaro kaj ĉio en la naturo paliĝas kaj velkas. La maljuneco estas la aŭtuno de la vivo, dum kiu la organismo degeneras kaj fariĝas kaduka kaj fine ne plu uzebla.

**6. La ciklo de la substanco aŭ la materio**
En la sama maniero, la substancoj estas submetitaj al ciklo kun kvar stadioj. La “radiforma” materio estas analoga kun la principo de la infaneco aŭ de la vintro, kaj la “gasforma” respondas al la junecprincipo. Ekstere en la universo naskiĝas la sunoj el la radiforma kaj gasforma stadioj. Poste ni atingas la “likvan” stadion, kiu estas en kontakto kun la principo de matureco. Post tio venas la “solida” formo, kiu estas en kontakto kun la aŭtunprincipo. Ni ĉiam vidas la materion en unu el la kvar stadioj de la ciklo, same kiel homo ĉiam situas en unu el la kvar stadioj: infaneco, juneco, matureco aŭ maljuneco. Ne troviĝas io ajn, kion ni povas observi en la mondo, kiu ne situas en unu el la kvar stadioj de la ciklo. Nenio povas ekzisti sen esti parto de ciklo.

**7. Kiel la kredo je unu vivo estiĝis**
La ciklo de homa vivo reprezentas nur unu ciklon, ĉar la sensoaparato aŭ la organismo ne transvivas la ciklon. La organismo estas destinita por ebligi al la homoj sperti ĉi tiujn kvar sezonojn. Sed ĉar la homoj ne povas vidi pli longe en tiu ĉi ĉeno da cikloj, ekestis ĉe multaj homj la superstiĉo, ke oni kreiĝis ĉe la gravediĝo kaj finiĝos per la morto, kaj jen la tuto.

**8. La ekkono de nerompita ĉeno de fizikaj vivoj**

Kial do la homoj vidu tiujn kvar principojn ripetitaj centojn kaj centojn da fojoj? – Tio havas kosman signifon kaj estas dieca parolo al la homoj, kio iom post iom helpos al ili kompreni, ke ankaŭ ilia propra vivo estas submetita al ciklo. La vivo ĝuste kreas ĉi tiujn ciklojn por montri, ke estas superstiĉo opinii, ke nur ekzistas unu vivo.

Ĉar tiu ĉi vivo do estas ciklo kun kvar sezonoj, ni povas fari konkludojn surbaze de la aliaj cikloj. Ĉar Dio aranĝis tiel ke multaj aliaj cikloj ekzistas, ekzemple la ciklo de la tagnokto, kie ni povas superrigardi ĉiun unuopan ciklon, konstateblas ke la unuopa ciklo estas nura ĉenero en ĉeno da cikloj. Kiam ĉiuj cikloj, kiujn ni povas superrigardi, estas ĉeneroj en nerompita ĉeno da cikloj, kial do la surtera vivciklo estus la absolute sola, kiu ne estas ĉenero en simila ĉeno da cikloj? – Oni vidas, ke por pensi logike kaj por esti en kontakto kun tio, kio ests ĝenerale valida, nepras akcepti, ke la surtera vivo, kiun la homoj kaj bestoj vivas, estas ĉenero en ĉeno da cikloj. Per la ekkono de tiu ĉi ĉeno da vivoj okazas io dieca, nome ke nova eltrovo aperas en la konscio: *Justeco ekzistas en la mondo.*

**9. La justeco de la vivo kaj la ŝtuparo de la evoluo**

Se oni pensas, ke nur ekzistas unu vivo, tiuokaze ne ekzistas ia ajn justeco en la mondo, nenio estas senmanka; la tuta mondostrukturo estas perversa. Ni vidas, kiel infanoj naskiĝas en la mondo sub tre diversaj kondiĉoj. Kelkaj infanoj naskiĝas kun malsano, naskiĝas ĉe primitivaj gepatroj, ricevas malbonan traktadon, malbonan vivmanieron, lernas nemoralon ktp. Aliaj infanoj naskiĝas ĉe amemaj gepatroj, ricevas klerigadon kaj edukadon kaj estos honorataj kaj respektataj en la socio. Kelkaj homoj venas en malfeliĉajn statojn kaj devojiĝojn, dum aliaj venas en lumajn kaj feliĉajn statojn. Tio ne povas havi sian kaŭzon en la nuna vivo. La malgranda infano naskita kun sifiliso aŭ alia malsano, ne mem povas esti la kaŭzo de tio, se nur ekzistus tiu ĉi unuopa vivo surtera.

Kiam ni do vidas, ke la nuna vivo estas rezulto de pli fruaj vivoj, tio estas pli komprenebla. Ni vidas, ke ĉiuj estuloj konsistigas grandan gamon da evoluŝtupoj, sube de la plej primitivaj stadioj antaŭen al pli kaj pli senmankaj stadioj. Se nur ekzistus unu sola vivo, ĉiuj homoj dum la nuna surtera vivo havus la samajn kondiĉojn de la naskiĝo kaj povus atingi la samon. Sed ni vidas, ke kelkaj naskiĝas tre primitivaj, kaj restas tre primitivaj, dum aliaj estas naskitaj kun grandaj talentoj kaj kapabloj, kiujn ili ne lernis dum ĉi tiu vivo. Ekzistas ekzemploj de "mirinfanoj", kiuj naskiĝas kun tiaj talentoj kaj kapabloj pri muziko, ke ili povas direkti grandajn orkestrojn. Kelkaj naskiĝas kun grandaj talentoj por pentri, desegni aŭ kun aliaj artaj talentoj, dum aliaj tre pene devas lerni tion. Ili devas ekzerci horon post horo ekzemple por povi ludi muzikon, kaj tamen neniam fariĝas vere lertaj dum ĉi tiu vivo. Se oni imagas, ke la kapabloj kaj talentoj estas kunportitaj de vivo al vivo, tiukaze oni povos atingi la senmankan stadion de la geniulo, kaj estas ĝuste tio, kion ni vidas.

**10. La kompreno de la dia parolo de la vivo**

Ni havas transdonojn de la grandaj saĝuloj pri tio, ke oni devas esti bona kaj amema, kaj ke tio kondukas al perfekteco ktp. Sed hodiaŭ tio ne sufiĉas por la homoj, ili preferas mem povi vidi la veron. Tiu mensa agordo fariĝos fundamento por la nova mondkulturo. En kunligo kun tiuj ĉi "pensoj ĉe la

novjaro" oni povas lerni, kiel oni vidu, kaj kiel oni per studo de la vivo povos kompreni la grandan dian parolon, kiu estas, por tiel diri, elkriita: *"Vi estas eterna, vi estas senmorta. Vian konscion, vian nunan kapablon kaj sorton, vi mem perlaboris dum viaj antaŭaj vivoj. Tiuj manifestaĵoj, kiujn vi rezultigas dum via nuna enkarniĝo, estas la semoj, kies rezultojn vi rikoltos dum via venonta vivo. Se temas pri manifestaĵoj kun malfeliĉaj konsekvencoj, rezultos malfeliĉa sorto, sed se kontraŭe temas pri manifestaĵoj kun bonaj konsekvencoj, la sorto de la venonta vivo fariĝos luma kaj feliĉa."*

### 11. La pozicio de la homaro en la kosma ciklo

Ni povas atingi eĉ pli da informoj fokusante sur tiuj ĉi cikloj. Ni povas vidi, ke la homaro ankaŭ situas en giganta, kosma ciklo. Kiel ni povas tion vidi? – La homaro ne povas esti ekster la sezonoj, ĝi devas esti en ia kosma aŭ mensa sezono. Kiun sezonon oni povas imagi al si, ke la homoj reprezentas? – Malgraŭ la grandaj talentoj kaj kapabloj de la homoj, ne ekzistas io, pri kio ili estas pli kapablaj ol *mortigi*. Ili povas nuntempe elimini tutajn milionurbojn kun ĝiaj kulturaĵoj. Ili povas aktivigi fortojn, kiuj povos detrui grandajn regionojn de la tera surfaco; tiel kapablaj ili estas. La homaro estas dividita en naciojn, kiuj vivas en anarkio. Ĉiuj armas sin, kaj tiuj, kiuj havas la plej bonajn kaj plej multajn armilojn kaj la plej multajn valorojn, estas la plej fortaj. Tio estas la principo de la morto, tio estas malvarmo kaj frosto. Tio ne estas la principo, kiu donas al la homoj feliĉon kaj beaton. La efiko de ĉi tio estas, ke la vivemo kaj la nervoj de la homoj difektiĝas. Rabado, murdoj kaj sinmortigoj okazas kun eksterordinara ofteco. Ĉu ne estas klare, ke jen la kosma vivo estas en sia plej malgranda aktiviĝo? Ĉu tio ne estas la sezono de la morto?

La homaro situas en la vintra zono de la kosma ciklo, sed ĝi survojas al la printempo, kio estas dieca, lumanta homa mondo. Ĝi estas la regno, pri kio Kristo diris: "Mia regno ne estas de tiu ĉi mondo". Post tio venos la somero, kio respondas al "la dia mondo", tute spirita stadio. Sed tion mi ne priparolu nun; oni povas legi pri la kosmaj regnoj en miaj libroj.

Sen tiu ĉi konfirmo de la pozicio de la homaro en la ciklo ni ja ne povus scii, kiun moralon ni adoru, kaj en kiu direkto la naturo kondukas nin. Ne indas kontraŭi la fortojn de la naturo. Ĉu kulo povas kontraŭi ŝtormon? – Se ĝi ne sekvas la ŝtormon, ĝiaj flugiloj estos rompitaj. Sekve ankaŭ la homoj rompas ilian konscion, vivemon kaj ĝojon, kiam ili iras kontraŭ la vivleĝoj kaj la fluo de la universo. Pro tio estas tre grave koni sian pozicion en la ciklo.

### 12. La printempaj ventoj - nova fluo en la mondkulturo

La homoj staras sur la sojlo de nova, kosma printempo, kaj ni jam povas senti novan fluon en la mondkulturo aŭ senti la printempajn ventojn, per kiuj la vintro malaperos. Ni vidas, ke la homoj en kreskanta grado deziras pacon. La printempaj ventoj estas ĉio, kio kontraŭbatalas la militon kaj deziras solvi aferojn en paca maniero. La printempaj ventoj estas ĉiuj fortoj kaj energioj, per kiuj la homoj povas pardoni, esti moralaj, bonaj kaj amaj. Multaj supozas, ke oni povas krei pacon per konstruo de la multaj armiloj kaj defendarmiloj, sed la fluo de la kulturo aŭ la universo frakasos ĉiujn tiajn imagojn.

### 13. Kiel oni ricevas subtenon de la tuta universo

Kiam ni nun scias, ke la intenco de la vivo estas, ke la homoj eniru en tiun novan epokon, do estas prudente, logike kaj science peni esti bona kaj krei ĝojon,

lumon kaj feliĉon. Tiel oni havas subtenon de la tuta universo, sed tion oni ne havas, se oni agas kontraŭe. Dum la ĉiutaga vivo la terokulturistoj devas atenti la sezonojn. Estus ja terure, se ili en decembro supozus, ke estas aprilo. Sed tiu eraro ofte okazas inter la homoj en ilia granda kosma ciklo.

Gravas ekkoni ĉi tiujn principojn, kaj ĉi tie ni kiel sciencan fakton vidos kiu moralo estas la fundamenta. Ne estas la militisma. Ĉar ne estas tiu, kiu portas pacon al la mondo. La paco estas ĉio, kio kondukas al tio, kion Jesuo Kristo diris en sia monta prediko. Ni rigardas, ke la parolo de la vivo aŭ la universo mem treege konfirmas kaj emfazas lian parolon. Tiuj, kiuj komprenas la parolon de la universo, ne renkontas la multajn krizojn kaj malfeliĉajn statojn, kiuj apartenas al la principo de la vintro. Ili komencas senti la printempon, kaj la paco komencas krei printempon en ilia propra interno. Post la printempo kompreneble venos somero, tiel la homoj havas tre ĝojan perspektivon. Eble ŝajnas al vi, ke longa tempo devos pasi. Sed ne mankas vivo, kaj jam hodiaŭ oni povas komenci fari la vivon agrabla. Oni havas subtenon, kiam oni pardonas homon, kiun oni ne ŝatas. Tiel oni estas *kun* la printempo, kiam oni komencas degeligi la glacipinglojn, kiujn oni havas ĉirkaŭ sia menso.

### 14. La rekta parolo de la vivo

Oni vidas, kiel diece la mondo parolas al la vivaj estuloj. La malgranda infano en la lulilo ne komprenas la parolon de la gepatroj, sed kiam ĝi elkreskas, ĝi lernas kompreni kaj paroli kun la gepatroj. Tiel la homaro nun staras sur la sojlo por povi paroli kun Dio. Ĝuste nun la homoj lernas paroli kun sciencistoj kaj filozofoj, sed ili iam parolu kun la universo mem kaj tiel lernos ĉiujn principojn, kiuj validas. Estas tiel diece kaj saĝe, ke ĉiuj principoj, kiujn oni ne povas superrigardi, ankaŭ ekzistas en malpli grandaj formatoj, tiel ke ili estas percepteblaj per ajna sensoaparato.

### 15. Spirita scienco kaj spirita esplorado

Per havi tiajn pensojn nun dum la novjaro, oni dum tiu ĉi nova jaro jam povas komenci preparadon tiel, ke la somero povos veni. Oni povas legi la kosmajn analizojn kaj komenci adaptiĝi al ili. Sed ne sufiĉas legi la analizojn, tio ne sufiĉas por elturniĝi. Tio, kion mi kreis, estas gvidilo por trovi vojon, manlibro pri viv-observado. Miaverko estas bazita sur tio, ke oni povu lerni kontroli miajn analizojn kaj pripensi miajn pensojn. Neniu kredu min; mi ne deziras krei kredantojn. Mi deziras krei scion kaj montri, kiel oni mem povas vidi ĉi tiujn faktojn. Oni ne havas utilon de ĉi tio, antaŭ ol oni mem povas vidi ĉi tion, antaŭ ol oni mem scias: Tiel estas! – Per mem esplori la fenomenojn kaj pripensi ĉi tiujn pensojn oni faros pliajn eltrovojn kaj eniros kampojn, kiuj kondukas al pli kaj pli sunriĉaj regionoj. Tio povas konduki antaŭen al tia stadio, ke oni povas ekrimarki la diecan printempon en ĉi tiu mondo, longe antaŭ la cetera homaro.

### 16. Por la unua fojo en la historio ekzistas kosma scienco sur la tero

Ekzistas aliaj planedoj, kiuj estas analogaj kun la terglobo. Kelkaj estas pli evoluintaj kaj aliaj malpli evoluintaj. La intelektaj homoj en pli fruaj tempoj, kiuj atingis tiun stadion, sur kiu la homoj estas hodiaŭ, devis daŭrigi sian evoluon sur pli alte evoluintaj planedoj, ĉar tiam ne estis kosma scienco sur la terglobo. Sed per la granda nova mondimpulso nun eblis krei kosman sciencon kun analizoj, per kiuj la homoj povas lerni esplori la vivon kaj la naturon per iliaj propraj sensoj kaj observoj kaj travivi: Tiel estas. Tiel estas

la realaĵoj. Per tio oni ekstaras firmege en la vivo. Oni povos vidi, ke oni povas decidi sian venontan sorton kaj jam hodiaŭ komenci krei manifestaĵojn, kiuj revenos kun lumaj efikoj. Sed multaj homoj blinde agas kaj supozas, ke ili faras la ĝustan, kvankam ili faras la malĝustan. En tiu maniero ili ne ricevos la travivaĵojn, kiujn ili atendas, kaj tiel multaj homoj iĝas malfeliĉaj, ĉar ili ne povas kompreni kial ili trairu tiun kaj tiun suferon.

**17. La neceso de la mallumo – la morto kiel liberigo**

Por la evoluinta homo, kiu deziras ekkoni la veron, estas absolute necese studi tiujn ĉi ciklojn kaj sperti, ke la vintro estas necesa stadio aŭ kontrasto. Sen kontrastoj oni ne povus sensi kaj travivi. Tial la tiel nomata malbono necesas.

Ni vidas, ke la gazetoj estas plenaj de rakontoj pri akcidentoj, kripligoj, suferoj kaj malsanoj, sed el kosma vidpunkto ne ekzistas io malbona. Oni povas demandi, kiom profunde la sufero eniras la sorton de la homoj. Nu, la korpo nur estas provizora; ĝi estas malgranda kaj maldika ŝirmvestaĵo, kies intenco estas povi preni la vundojn. En la momento, kiam ĝi estas tiom difektita, ke ĝi ne estas uzebla, oni liberiĝas de ĝi. Estas tio, kion multaj tiom timas. Ili kredas, ke ili mortas, sed ili tute ne mortas. Ja estas diece, ke oni povas liberiĝi de io, kio estas ĝeno kaj doloro, io, kio ne plu povas esti uzata. Estas diece, ke la mortmalsanaj kaj la vunditaj kaj la mortigitaj sur la batalkampoj povas esti liberigitaj. De la fizika sfero aspektas terure, sed de la spirita sfero estas dieca prizorgo esti liberigita de ĉiuj fizikaj mallumaj stadioj. Pli poste oni estos preparata por denove eniri la fizikan sferon por lerni pensi perfekte. Tio ne estas lernebla en la spirita sfero. En la spirita sfero estas neniuj malĝojoj, zorgoj, suferoj, kripligoj, mortigoj aŭ murdoj – se ĉio estus unueca, ja ne ekzistus dieca mondo.

**18. La vojo al klarigita stadio**

Estas dieca aranĝo, ke ekzistas speciala regiono, kie la homoj en sia nescio povas devii kaj fari, kion ili volas. Per tio ili ekkomprenos, ke tio, kion mi faris tie, tio ne estis bona, sed tio, kion mi faris tie, estis bona. Per tio ili kreskas al pli kaj pli granda konscio, kaj ili kreskos tiom, ke ili povas lerni per la spertoj de aliaj, kaj tiam la progreso komencas iri rapide. Kiam oni povas komenci lasi la librojn kaj legi en la vivo mem, tiam io okazas, kaj oni komencas esti fundamente konscia. Kiam oni trejnas sin sekvi la naturon kaj fari printempajn ventojn kaj sunbrilon por siaj ĉirkaŭoj, oni iun belan tagon estos volvita en tute alia konsciostadio: Dio rivelos sin. Okazos transformado en kelkaj cerboĉeloj, kiuj hodiaŭ estas latentaj, sed kiuj iagrade estas trejnataj per la kosma studado aŭ la spirita esplorado. Iun belan tagon tiuj ĉeloj malfermiĝos por nova konscio, kaj tiam oni estos konscia ne nur en la fizika, sed ankaŭ en la spirita mondo. Oni fariĝos plene tagkonscia en la tuta strukturo de la universo, en sia propra senmorteco, en sia propra sorto, ja, en la sortostato de la tuta homaro. Oni havos nelimigitan aliron al la kosma scienco kaj al la konscio de Dio kaj en la fizika sfero oni atingos vivi en vere klarigita stato.

*Originala dana titolo: "Tanker ved årsskiftet", artikolo n-ro M2245. Surbendigita prelego de Martinus 1960.01.05 en Martinus-Instituto. Prilaboris la danan registraĵon Ole Therkelsen. La prilaboraĵo estas aprobita de la konsilio de Martinus-Instituto. Unua publikigo en la dana Kosmos n-ro 1, 1992. La originan esperantan tradukon de Ejnar Langkilde prilaboris Hokan Lundberg kaj Henning Sato von Rosen.*

Simbolo n-ro 26

# La venonta perfekta homregno

de Martinus


M0551

**Tio, kio progresigis la homaron al la komenciĝanta stadio de proksimula amo**

**1.** Ni nun progresis tiom en nia analizo pri la evoluo de la homaro, ke ni povas transiri al klarigo pri la dia finrezulto, kiu estas la celo de Dio koncerne la fizikan vivon de la homaro. Dum oceano da tempo, jarmilojn post jarmiloj, la homoj ĝemis kaj anhelis pro tiu mallumo de sufero, kiun ili per sia tre primitiva kaj egoisma aŭ pli aŭ malpli besta konduto rezultigis por si mem. Ni scias, ke ili troviĝas sur tre longa evoluŝtuparo ekde la simia homo antaŭen al la nuntempa materie tre evoluinta kultura homo, kaj ke pli frue ili evoluis dum pasado tra la minerala, planta kaj besta regnoj. Por komplete perfekte povi sperti la vivon, necesas plenumi tiujn leĝojn, sur kiuj la komplete perfekta vivtravivado estas bazita. Ni scias nun, kial ekzistas mallumo aŭ suferoj, kaj ke ili estas efikoj nur de erara rilato al tiu vivo, kiu ĉirkaŭas nin: la naturo, la bestoj kaj la homoj. Dum la multaj fizikaj teraj vivoj en tiu longega evoluepoko spertado de oceano da suferoj kreis tiun scion, tiun talentaron, tiun konduton, tiun proksimulan amon, kiujn la homoj povas praktiki nuntempe.

**La kaŭzo, ke ne estas strange, ke la homaro de la tero estas envolvita en la sfero de milito kaj sufero**

**2.** Multaj el la nuntempaj homoj sur la tero eĉ ne progresis al la "A-stadio" de la amtalento, t.e. al ĝia teoria komenca stadio. Kaj ankoraŭ pli malmultaj el ili atingis ĝian "B-stadion", kiu estas la komenciĝanta praktikado de la talento. Kaj preskaŭ neniuj atingis la "C-stadion" de tiu talento, kie praktikado de la talento fariĝis kutimo kaj per tio pli aŭ malpli fariĝis aŭtomata funkcio aŭ kapablo.

Se troviĝas estuloj en tiu lasta stadio, ili estas enkarniĝintaj de pli alta mondo kaj sekve estas gastoj sur la tero. Tiel alta perfekta gasto estas ekz. Kristo. Lia regno ja ne estis el ĉi tiu mondo (Joh. 18.36). Kun ankoraŭ tiel malgranda amevoluo sur la tero ne estas strange, ke ĝiaj kontinentoj kaj maroj estas envolvitaj en atmosfero de milito, malfeliĉo kaj sufero, kio fojon post fojo igas inferon aŭ kataklismon realiĝi, kaj igas mortotimegon vastiĝi sur la tero.

**La bestoj necese vivas en la zono de la mortiga principo**

**3.** Kio do ankoraŭ malebligas al la homaro vivi en socio de veraj feliĉo kaj lumo? – Tio kompreneble estas la besta flanko de la homo. La vivleĝo de la besto estas tiu, ke *ĉiu por si mem estas la plej kara.* En la regno de la bestoj ĉiu estulo devas per aŭtomata sinkonserva instinkto mem zorgi pri si, se entute ĝi havu eblon ekzisti. Ĝi devas per ruzo, potenco aŭ kamuflaĵo klopodi akiri siajn proprajn vivbezonaĵojn. Por multaj estuloj estas eĉ vivkondiĉo manĝi animalan nutraĵon, kaj tial ili devas mortigi tiujn bestojn, kies organismojn

ili necese uzu kiel nutraĵon, kaj ili havas ankaŭ vivdanĝerajn rivalojn pri tiu nutraĵo. Sekve ili havas absolute nur tiun sekurecon, kiun ili povas krei per siaj propraj potenco kaj forto, ruzo aŭ kamuflaĵo. Krom tio ili devas per la samaj ecoj klopodi protekti siajn idojn, kiuj ankaŭ estas persekutataj de aliaj bestoj por satigi ties malsaton. Ke la mortiga principo estas vivkondiĉo por tiaj estuloj estas do memkompreneble.

### La vivo de la homoj en la mortiga principo

**4.** La bestoj devas do vivi en interbatalo kaj mortigado. Tial la mortigaj kapabloj fakte fariĝas eĉ virtoj ĉe tiuj estuloj. Sed kiel estas por la homoj? – Ĉu ili estas tute dekutimigitaj vivi en tiu sama maniero? – Ĉu ne ankaŭ ili grandskale buĉas, mortigas kaj malliberigas bestojn? – Tion ili ja absolute faras. Ke ankaŭ ili ricevos severan karmoredonon estas memkomprenebla sekvo. Estas nur tiu diferenco inter la karna nutraĵo de la bestoj kaj tiu de la homoj, ke dum ĝi estas vivkondiĉo por la karnomanĝaj bestoj, ĝi absolute ne estas por la homoj. Sed nur treege malgranda parto de la homoj ekvidis tion kaj sekve ĉesis uzi animalan nutraĵon. Ili uzas nur vegetarajn nutraĵojn. Ankoraŭ la cetera parto de la homaro tute ne komprenas, ke necesas rezigni je animala nutraĵo kaj ŝanĝi al vegetara, kaj sekve ili povas konsideri tion preskaŭ nur abnorma. Sed sole per tiu flanko de sia konduto tiuj viandomanĝantoj havas tiom da atendanta mortokarmo, ke ili riskas morti kiam ajn en katastrofoj aŭ akcidentoj.

### La karmostruktura disdivido de la hela kaj la malluma karmospertoj

**5.** Grandaj periodoj povas pasi, eĉ pluraj fizikaj teraj vivoj, sen tio, ke la estulon trafas malluma karmo, kaj tion kaŭzas ekskluzive tiu dia strukturo, al kiu la karmo estas submetita, kaj kiu, kiel ni menciis antaŭe, kaŭzas la sumiĝon de la karmo por realigo kune kun simila karmo de aliaj homoj. Tiu kolektiva realigo de sumigita malluma karmo okazas en formo de militoj kaj mondmilitoj kaj per naturkatastrofoj, malsanoj kaj akcidentoj.

Grandatrajte la karmo de pluraj vivoj kelkfoje koncentriĝas al posta realigo en unuopa vivo aŭ aliaj mallongaj periodoj, kaj tio kreas spacon tiel, ke inter ili la estulo havos okazon ĝui ankaŭ relative helajn aŭ feliĉajn vivojn, tute laŭ la bono, kiun ĝi faris al sia proksimulo.

### La kolektiva karmospertado de la homoj

**6.** La tera homaro konsistas do el homgrupoj, kiuj destiniĝas al komuna karmorealigo. Sekve tiuj kolektivaj karmorealigoj plagas la fizikajn vivojn de la homoj, kaj, kiel menciite, ili okazas per militoj, naturkatastrofoj, malsanoj kaj akcidentoj de ĉiuj specoj. Ĉar tre granda parto de la homaro ankoraŭ ne troviĝas eĉ en la A-stadio de la proksimula amo, ĝi konforme al tio kreadas oceanon da manifestaĵoj, kiuj siavice kreos samgrade malluman karmon en la estonteco en formo de tiuj krudaj kataklismoj, kiuj ankoraŭ turmentos la teran homaron. Kiel alie tiu granda parto de la homaro envenu en la A-stadion de la proksimula amo kaj atingu evoluon de tiu dia kapablo? –

### La homregno laŭ la bildo de Dio komencas aperi en la malproksimo

**7.** Sed meze en la realigado de la kataklismoj fare de la kulmina mallumo de la homaro, troviĝas tamen tiu granda luma faktoro, ke laŭ kosma vidpunkto tiuj realigoj de mallumo estas menspuriga bano, kiu levas la homon for de la regiono de la besta regno kaj la mortiga principo. Krome tiu evoluo nun

okazas tiel rapide, ke la reala fina aŭ perfekta homregno laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27) jam komencas vidiĝi en la malproksimo. Kaj tiu aperanta rava vidaĵo: la perfekta homregno, estas efektive la samo kiel "la regno de Dio" aŭ "la regno de la ĉielo". La brilanta lumo de tiu dia regno komencas nun leviĝi super la sferon de mallumo kaj suferoj, kaj ekde nia tempo kaj antaŭen ĝi inspiros, en formo de spirita scienco kaj kosmaj analizoj, la konscion de la homaro al proksimula amo. Kaj nun ni komencas montri tiun venontan regnon de proksimula amo en la tera fizika vivsfero.

**Tiuj homoj, kiuj kreos la perfektan homregnon sur la tero**

**8.** La perfekta homregno kompreneble estos liberigita de ĉiuj tiuj manifestaĵoj, kiuj estas rezulto de nescio aŭ mensa nefina stato kiel: envio, ĵaluzo, posedavido, netoleremo, malamo aŭ venĝemo, orgojlo kaj malestimo al aliaj homoj, kolero kaj amaro kaj aliaj mallumkreaj pensospecoj en la konduto. Ĝuste la forigo de tiuj elstaraj kataklismaj aŭ inferaj pensoj el la ĉiutaga konduto de la homoj, kaj samtempe la progresanta kresko de la proksimula amo, kreos la menciitan regnon de lumo. Kaj kiel antaŭe menciite, jam ekzistas granda grupo da homoj, kiuj tre progresis en sia elpurigo de la bestaj inklinoj el siaj konscio kaj konduto. Tiu grupo pligrandiĝas per tiuj homoj, kiuj iom post iom trapasas sian malluman karmon kaj sekve en novaj enkarniĝoj estos portantoj de la paco kaj la proksimula amo. Laŭ la strukturo de la mondliberigado ili kreos la perfektan homregnon sur la tero.

**Mono fariĝis malhelpo al vera mondmoralo**

**9.** En sia fina stato la perfekta homregno estos komplete senigita de tio, kion nuntempe ni nomas "mono". – Laŭ sia pura kosma principo mono estas bonega interŝanĝilo kaj ne devus esti io ajn alia. Sed iom post iom mono fariĝis objekto, kiu kreas oceanon da ekonomiaj suferoj, deprimoj kaj sinmortigoj. Ĝi fariĝis malhelpo al vera mondmoralo. Per spekulacio kaj amassugestio la monbileto fariĝis falsa esprimo de valoro. Monbileto prezentiĝas kiel garantia dokumento pri la ekzisto de speciala nominala valoro. Tia monbileto povas ekz. esti esprimo de sumo je dek kronoj.* Tiu sumo estas do esprimo de valorkvanto de speciala grando. Sed kiel oni atingas la grandon de tiu valorkvanto? – Ĝi kreiĝas pro mendo. Se okazas granda mendo de iu certa varo, do ĝi estas konsiderata kiel pli valora. Ĝi fariĝas pli multekosta. Ĝia mona valoro samgrade altiĝas tute sen ia ajn plibonigo de la koncerna varo. La grando de la vara valoro do fiksiĝas – ne de la valoro de la varo kiel utilobjekto, – sed male nur laŭ la mendo de tiu varo. Kutime la mendo fariĝas granda, kiam mankas la varo. Ĝuste tiu embaraso pro manko de la varo fiksas ĝian prezon. Tiu prezo de la varo estas ja absolute falsa prezo, ĉar, kiel menciite, en si mem la varo neniel pliboniĝis. La komerca valoro de la varo estas do falsa valoro, kies grando fiksiĝas de la bezono de homoj pri tiu varo, kiu povas esti tre vivgrava. Ĝuste tiu manko de varoj levas la monan kurzon. Se tiu varo abundas, la mendo kompreneble malgrandiĝas, kaj tiam ĝia prezo reduktiĝas ankaŭ sendepende de la varo mem, kiu kompreneble kiel uzobjekto havas neŝanĝitan valoron. Tiel la varaj prezoj kaj la monaj kurzoj dependaj de ili leviĝas kaj reduktiĝas tute sendepende de la vera valoro de la varo kiel utilobjekto. Ekonomia

*) Krono estas dana monunuo

sistemo, kiu devigas la homojn pagi por la varoj prezojn, kiuj tute ne rilatas al ilia vera valoro, sed male estas superprezo, estas pago per mono, por kiu la kliento ricevas absolute nenion, sed kiu altgrade riĉigas la vendiston, ĉu tia ekonomia sistemo povas esti en kontakto kun la kristanismo? – Ne, ĝi absolute ne povas. Tiu sistemo estas altgrade pagana. Riĉigi sin mem pro mankego kaj malfacilaĵo de aliaj homoj similas al ĉantaĝo. Se ekz. en oficiale rajtigita butiko homo aĉetas paron da ŝtrumpoj, kiuj kostas 10 kronojn, ĉu tiam ĝi havas garantion, ke tiuj ŝtrumpoj vere reprezentas tiun valoron? – Tiu kiu vendis la ŝtrumpojn, eble aĉetis ilin por 6 kronoj. Tio estas do alia kaj malpli granda valorkvanto ol la 10 kronoj. Tie la aĉetanto sekve donis pli grandan valorkvanton por malpli granda valorkvanto. Tie la vendisto propriĝis al si valorkvanton je 4 kronoj, por kiu li donis absolute nenion. Tie la 10 kronoj do ne estis interŝanĝilo, sed male estis ilo, per kiu la vendisto povis akiri valorkvantojn tute senpage, kaj sekve iel ĝi estis fraŭdilo. Sed plej grave estas, ke en la tuta mondo laŭ la nocio komerco tiu fraŭdilo estas rajtigita kaj laŭleĝa, kaj simile la senpage akirita valorkvanto je la 4 kronoj esprimiĝas kiel "honesta gajno".

### La maniero, en kiu estiĝas riĉo kaj malriĉo

**10.** Milionoj da homoj en la tuta mondo vivas altnivele per tiu senpaga "gajno" aŭ akiro de valoroj, por kiuj ili donas absolute nenion, kaj tial ne estas strange, ke riĉego eĉ monte amasiĝas ĉe iuj estuloj kaj aliloke kreas konforme profundajn valojn de malriĉego, mankego kaj mizero. Sed laŭ kosma vidpunkto tiu komerca sistemo devus esti nur interŝanĝa sistemo bazita sur la fundamento: *sama valoro por sama valoro*. Ĝi ne devus esti sistemo, per kiu oni povas laŭleĝe akiri valoraĵojn de aliaj homoj donante nenion ajn kiel kompenson.

### Ne estas strange, ke la monda ekonomio estas mankhava

**11.** La moderna komerca mondo estas bazita sur tiu kamuflita komerca sistemo, kies principo estas akiro de kiel eble plej granda valorkvanto por kiel eble plej malgranda valorkvanto, kio fakte estas la samo kiel kamuflita rabo. Tial ne estas strange, ke la monda ekonomio estas mankhava. Ekonomiaj krizoj kaj ruiniĝoj okazas. Malriĉo, mankego kaj mizero estiĝas. Kaj la mondo estas plena de ĝemoj kaj lamentoj de la multaj homoj, kiuj pro tiu mankhava sistemo fariĝis almozpetantoj, kiuj eĉ ne havas ĉiutagan panon.

### Nek registaroj, nek politikaj partioj aŭ unuopaj homoj estas riproĉindaj pro tiu mankhava ekonomia sistemo de la homaro

**12.** Ĉi tie oni certe kontestas dirante, ke per aĉeto kaj vendo oni necese ricevu "gajnon" de ĉiu vendo, ĉar kiel alie komercistoj povus vivi? – Kaj tio estas ja tute ĝusta. Tiel longe kiel la tuta komerca mondo havas kiel bazon por sia ekzisto tiun tiel nomatan "gajnon", tiun kamuflitan principon de rabo, ĝi kompreneble ne povas ekzisti sen tiu principo. Ĉiu komercisto, ĉiu firmao ja necese funkciu en tiu sistemo por povi ekzisti kiel tia. La kondiĉoj por povi forigi tiun raboprincipon el la komerca mondo ja ankoraŭ absolute ne ekzistas. Tial ni deziras rimarkigi, ke ĉi tiu analizo de la komerca mondo kaj de la ekonomio, absolute neniel ajn estu riproĉo kontraŭ iu aŭ io. La menciita "komerca mondo" estas sistemo, de kiu dependas la koncernaj unuopaj estuloj. La sistemo havas mondan amplekson kaj neniel estas transformebla, nek per unuopa homo nek per iu registaro aŭ politiko. La transformado de la sistemo estas

ekskluzive evoluo. Sed pro sia neperfekteco aŭ nefina stato la sistemo tamen estas malobeo al la kosma monda moralo, same kiel ĉiuj ceteraj malobeoj al la kosmaj leĝoj, en kiuj vivas la homoj. Tial la homoj ricevos la karman suferon aŭ kataklismon sekvantan de tio. Tiuj spertoj, scio kaj evoluo de proksimula amo, kiujn tio rezultigos en la konscio de la homaro, estas la absolute sola faktoro, kiu povos transformi la sistemon. Kaj en kunligo kun la spirita scienco tiu transformo nepre okazos, kaj kiel fina rezulto realiĝos ekonomie en kulmina justo.

**Tio, kio faras la monon malbono**

**13.** Tio, kio karakterizas monon estas, ke en si mem ĝi estas nur interŝanĝilo kaj nenio ajn alia. Tial oni povas plenrajte uzi monon nur kiel rimedon por doni *la saman valorkvanton por la sama valorkvanto*. Ĉiu ajn alia uzo de mono estas malbono. Se per tiu interŝanĝilo oni akiras pli grandan valorkvanton por malpli granda valorkvanto, la mono en tiu kazo ne plu estas interŝanĝilo. En tia kazo ĝi estas fraŭdilo. En nenia ajn kazo povas esti justa ago proprigi al si pli grandan valorkvanton por malpli granda valorkvanto. La profito, kiun reprezentas la pli granda valorkvanto rilate al la malpli granda valorkvanto, estas do valorkvanto, por kiu oni faris absolute nenion. Tio signifas, ke oni povas akiri valorojn farante nenion ajn kiel kompenson. Sed kiel iu homo povas meriti tiun senpagan valoron? – Ĝi povas esti posedaĵo absolute nur de homo, per kies laboro ĝi kreiĝis. Kiel iu homo povas havi rajton tiel vivi surbaze de la valoroj de aliaj homoj? – Tamen pro misuzo de la mono milionoj da homoj dise en la mondo vivas surbaze de laboro de aliaj homoj neniel ajn kompensante tion. Ke tio kreas malluman karmon estas evidente. Plenrajte oni povas akiri pli grandan valorkvanton per malpli granda valorkvanto nur, se tiu akiro estas senkondiĉa donaco de la posedanto de tiu valorkvanto.

**La mona valoro kaj la reala valoro de la valorkvanto aŭ komerca varo**

**14.** En la komerca mondo ni vidas, ke laŭ valoro aŭ mona prezo grandiĝas kaj malgrandiĝas valorkvantoj, t.e. komercaj varoj. Sed kiel valorkvanto povas havi alian valoron ol tiun, kiun ĝi fakte havas? – Kiel ĝi povas havi unu valoron hodiaŭ kaj alian morgaŭ aŭ pli poste? – Kiel glaso, kiu ne estas rompita, povas ŝanĝiĝi laŭ valoro? – Tiel longe, kiel ĝi ne estas rompita, ĝi nepre havas la saman valoron ekde sia kreiĝo kaj ĝis la rompiĝo. Sed malgraŭ tio la glaso povas havi unu prezon hodiaŭ, kiu morgaŭ povos esti altigita aŭ malaltigita, kvankam en si mem la glaso tute ne estas ŝanĝita, kaj sekve estas same utila. Kiel aliaj komercaj varoj povas esti submetitaj al tiu sama sistemo? – Ĉu ne ĝuste ĉi tie ni vidas, ke ne estas la valoro kiel trinka glaso, kiun oni konceptas kiel ĝian veran valoron, ĉar en tia kazo la prezo de la glaso devus esti tute senŝanĝa tiel longe, kiel la glaso estas normale uzebla. Do ne estas la produktoprezo de la glaso, la materialo kaj la labora salajro, kiuj fiksas la prezon. Male, la grando de la mendo fiksas la prezon de tiu varo. Se la mendo pri iu komerca varo estas granda tiel, ke malfacile oni povas kontentigi ĝin, tiam oni altigas ĝian prezon. Se male abundas la varoj, oni reduktas ilian prezon. Se iu varo mankas, oni povas do altigi ĝian prezon. Kaj ju pli vivgrava estas tiu varo, des pli oni povas altigi la prezon. Tie oni povas do ekspluati la embarason aŭ malfacilan situacion de homoj pro ilia manko de vivgravaj varoj, postulante por tiuj pli altan prezon ol kutime, kvankam la esenca valoro de la varoj kiel utilobjektoj estas tute neŝanĝita.

Ĉu povas esti morale tiel ekspluati la mankegon kaj embarason de homoj devigante ilin pagi por varoj pli da mono ol la fakta kaj reala valoro, tute sendepende de tio, ke la produktoprezo ne altiĝis? – Do ne la reala valoro de la varo kiel util- aŭ uzobjekto fiksas ĝian prezon, sed male ĝia valoro kiel objekto por spekulacio pri monriĉigo. Tio ŝajnas simila al ĉantaĝo. Pro granda mendo pri iu varo oni do devigas homojn pagi por ĝi – ne nur ĝian realan valoron – sed ankaŭ aldonitan ekstran valoron, kvankam ĝia reala valoro kiel utilobjekto estas komplete neŝanĝita. Ke tia sistemo kunefikas por krei kataklismon, estas natura sekvo kaj havas nenion komunan kun vera humana kulturo. Sed, same kiel pro ĉiu alia nefina stato, neniuj estas riproĉindaj pro ĝi, nek registaroj nek politikistoj. Tie, kie la homaro ne estas perfekta aŭ finkreita, ĝi neniel povas agi perfekte. Sed per la efikoj de tiu ĝia eraremo aŭ nefina stato la evoluo progresigas ĝin al perfekteco.

**La homoj monopoligis inter si la materiojn de la tero**

**15.** Kion oni komprenas per la nocio valoro? – Ĉio, kio utilas por la vivtenado de la vivaj estuloj, necese reprezentas valoron. Tiel la tuta naturo kun ĉiuj siaj materioj reprezentas vivkondiĉon por la vivaj estuloj. Tiuj materioj de la naturo havas do nemalhaveblan valoron. Laŭ kosma vidpunkto tiuj materioj kreitaj de la naturo absolute ne estas destinitaj por esti komerca varo. Ili estas kovrita tablo por ĉiuj vivaj estuloj, kiujn Dio lasis enkarniĝi en la fizikan mondon. Laŭ la senco de la vivo devas troviĝi nutraĵo, trinkaĵo kaj ĉiuj aliaj necesaj materioj por la vivtenado de absolute ĉiuj ekzistantaj estuloj sur la terglobo. La sola postulo al la estuloj estas ilia propra kapablo sidiĝi ĉe la tablo kaj manĝi. Sed kapablo estas la samo kiel talento. Kaj talento estas io, kio devas evolui. Kaj ni vidas, ke la vivaj estuloj ne havas saman talenton por manĝi de la vivmanĝo donita de Dio. En la evoluo ili ankoraŭ ne atingis la komplete perfektan manĝokapablon, kiu ĉi tie signifas: la komplete perfektan konduton. La plej fortaj estuloj forpelas la malpli fortajn de la manĝotablo. Tial en plej malbonaj kazoj tiuj laste menciitaj estuloj neeviteble malsatas kaj suferas pro mankegoj, dum la fortaj estuloj vivas en ekscesa manĝado kaj tute ne povas konsumi la tutan manĝaĵon, de kiu ili pli aŭ malpli altgrade kapablas forbari la aliajn estulojn. Tio validas ne nur por la veraj bestoj, sed ankaŭ tute supren en la regiono de la besta aŭ nefina homo. Tie ni vidas preskaŭ kulminan monopoligon de la materioj de la naturo mem. Antaŭ longe certaj homgrupoj monopoligis la vivgravajn materiojn de la tero, la karbojn, oleon, mineralojn, metalojn kaj tiel plu. Tiel estas ankaŭ por la surfaco de la tero mem, kiu estas plene monopoligita, t.e. kampaj kaj arbaraj areoj, regionoj kun lagoj kaj strandoj kaj simile. La naturaj materioj de la tuta terglobo, alivorte la manĝaĵo sur la manĝotablo de Dio, fariĝis privata posedaĵo de multaj homgrupoj. Sed kiel estas do por la multaj aliaj gastoj ĉe la manĝotablo de Dio, por kiuj ja ne estas manĝaĵo, ĉar ĝi fariĝis laŭleĝa privata posedaĵo de malgranda parto de la individuoj de la homaro? – Kiel tiuj multaj estuloj povus ricevi manĝaĵon ĉe la manĝotablo de Dio, kiam ili ne havas monon kaj sekve ne povas aĉeti ĝin? – Ili devas do klopodi rabi ĝin per ruzo, perforto kaj potenco. Kaj per tio estiĝas la tiel nomata “krimula mondo”. Efektive tio plue signifas mondon, kiu fakte tute ne estas krimula mondo, same kiel la estuloj en ĝi ja absolute ne estas krimuloj. Ĝi estas socio de estuloj, kiuj estas handikapitaj koncerne akiron de la necesaj vivbezonaĵoj, ĉar tiuj estas monopoligitaj de la cetera parto

de la homaro. Per sia privata posedo de la vivmaterioj de la naturo la reganta parto de la homaro fakte kunagas por enigi la senposedan parton de la homaro en vivdaŭran batalon aŭ militon pro ĝia ekzisto. Kaj ĉiun unuopan tagon la homaro vivas en tiu milito, kiu kelkfoje ekstremiĝas kiel mondmilitoj, juĝotagoj aŭ kataklismoj.

**La sola absolute vera kaj reala valoro estas la homa kreokapablo**

**16.** Ne estas strange, ke estiĝas militoj kaj mondmilitoj aŭ kataklismoj. Kiel iuj homoj povas havi rajton privatigi vivmateriojn de la naturo kiel propran posedaĵon? Ili estas ja destinitaj kiel materialo por la vivkonservado de ĉiu viva estulo? – Ĉu ne tiuj vivmaterioj estas donacitaj al la tuta homaro kiel komuna posedaĵo, same kiel lumo kaj varmo de la suno? – La tero estas provizita per la menciitaj vivgravaj materioj por la ekzisto de la homoj, sed tio ne kostis al iu homo unu oeron* aŭ unu solan minuton da laboro, senkonsidere ĉu temas pri karbo, oleo, metaloj ktp. – Kiu povus do havi rajton konsideri tiujn materiojn sia privata posedaĵo kun rajto monopoligi ilin kiel objektojn de riĉigo nur por si mem? – Ĉu ne ĝuste ĉiu estulo estas heredanto de tiuj materiaj partoj, kiuj necesas por ĝiaj ekzisto kaj vivkonservado? – Ili absolute ne estas destinitaj por esti monopoligitaj objektoj de riĉigo por nur unuopaj grupoj de homoj. Ĝuste la herede rajtigitaj materioj de aliaj homoj estas ja pli aŭ malpli forrabitaj de ili, kaj tial malfaciligas al ili konservi la vivon. Neniam ajn povos fariĝi paco en la mondo tiel longe, kiel ekzistas tiu kaŝita rabosistemo. Sed la sistemo rezultigos tiom da suferaj spertoj kaj militostatoj, ke la homoj ne povas eviti ekvidi tiun sian eraran vivdirekton. Oni necese lernu kompreni, ke la vivmaterioj de la naturo estas destinitaj por absolute ĉiuj ekzistantaj estuloj, kaj tial absolute estu ekster monopoligo kaj posedrajto. En nenia ajn kazo ili povas havi vendovaloron, ĉar laŭ kosma vidpunkto ili estas posedaĵo de ĉiuj homoj. Sed la plej granda parto de tiuj vivmaterioj de la naturo ne estas taŭga por homa uzo sen tia transformo, ke ili fariĝas tre gravaj uzobjektoj en la vivkonservado de la homoj. Tiu transformo estas ebla nur pere de la homa kreokapablo. Tiel tiu kapablo fariĝas la sola vera valoro en la vivkonservado de la homo. Praktikado de la homa kreokapablo estas do necesa, por ke la materioj povu transformiĝi al uzo en la homa vivkonservado. Sen tiu transformo la materioj de la naturo ne povus fariĝi vivgravaj uzobjektoj. La domoj, en kiuj ni loĝas, la vestoj per kiuj ni estas vestitaj, la transportiloj, kiujn ni uzas, kaj ĉiuj ceteraj bonaĵoj konstruitaj el la materio, kiel ili povus estiĝi sen tiu homa kreokapablo, per kiu ili estas produktitaj? – Ĉar la vivgravaj produktoj aŭ kreaĵoj neniel povus estiĝi sen la menciita homa kreokapablo, do tiu necese estas la absolute sola vera valoro rilate al tiuj menciitaj vivgravaj kreaĵoj. En si mem ili reprezentas nenian ajn valoron. Ili estas nur materikombinoj. Ĉu ili estas utilaj aŭ ne utilaj dependas de la kapablo, per kiu ili estas kreitaj. La materio, el kiu ili estas kreitaj, estas ja posedaĵo de ĉiuj, kaj ĝi havas nenian ajn monan valoron. Ke nuntempe tia kreita utilobjekto aŭ vivprodukto reprezentas monan valoron, tion kaŭzas la tuta erara strukturo de la monda ekonomio, al kiu la homoj estas submetitaj pro ilia komplete kosma nescio kaj nefina stato.

*) Oero estas dana monunuo

**Ĉiu homo, kiu naskiĝas, estas heredanto de tiu materio, kiu necesas por konservi ĝian vivon**

**17.** Kiel jam menciite, ĉiu estulo, kiu naskiĝas sur la tero, estas heredanto de tiom de la naturproduktoj aŭ materio de la tero, kiom necesas por konservi ĝian vivon en natura bonfarto. Sed ankoraŭ la homaro ne havas scion pri tiu hereda rajto. Tial ĝi ankaŭ ne havis ian ajn influon sur la disdividon de la materio en la mondo. Ĝis nun tiu okazis nur pere de superaj potenco kaj inteligento. La supere fortaj kaj lertaj homoj ekspluatis la malpli fortajn kaj malpli lertajn, kaj faris sin posedantoj kaj regantoj de la materioj de la tero, ne nur de tiu parto kiu apartenas al ili mem, sed ankaŭ de tiu materio, kiu fakte apartenas al aliaj homoj. Pro sia besta naturo la fortaj homoj povis akiri la vivgravajn materiojn de la malpli fortaj. Tiuj sekve devas, se ili havas la kapablon, aĉeti la necesajn vivmateriojn ĉe tiuj senrajtaj posedantoj de la materioj. En mala kazo la malpli fortaj devas pro bonvolo de aliaj homoj vivi per almozpetado tie, kie ili ne fariĝas “krimuloj” kaj vivas per rabado, aŭ en pli bonaj kazoj per ŝtelo, fraŭdo kaj ĉarlatanaĵo.

**Erare la vivgravaj materioj estas ŝanĝitaj al komercaĵo ŝarĝita per artefarita valoro kaj esprimita per mona sumo**

**18.** En la homa kreado de la vivgravaj uzrimedoj kaj utilobjektoj oni uzas la materiojn de la naturo. Ĉar laŭ kosma vidpunkto la materio estas senpaga, do nur la kapablo, per kiu la utilobjekto estas kreita, havas realan valoron. Kaj la utilobjekto sekve reprezentas absolute nur la valoron de tiu kapablo. Sed tamen ĉiuj kreaĵoj, ĉiuj utilobjektoj aŭ uzrimedoj reprezentas ne nur tiun valoron de kapablo, kiu estas tute reala, sed al ili estas aldonita ankaŭ prezo de tiu herede rajtigita materio, kiu estas la materialo por ili. Ĉiuj fakte posedas tiun materion aŭ materialon, kaj sekve la pago absolute ne havas rajtan bazon. Sed malgraŭ tio troviĝas por ĉiu komerca varo aŭ kreita produkto prezo enkalkulita por la materialo, ĝuste tiu senpaga materio. Ĉiuj kreaĵoj, kiuj ekzistas sur la tero, ĉiuj ekzistantaj komercaj varoj, vivgravaj varoj kiel ankaŭ luksaj varoj, ĉiuj specoj de utilaŭ uzobjektoj kreitaj de la homoj, ĉiuj estas kiel komercaj varoj ŝarĝitaj per tiu falsa prezo de materio. La materio, kiu anticipe apartenas al la aĉetanto, estas pagenda, kaj tio estas do fatalaĵo en la situacio. En tiu kazo la vendanto ricevas pagon, por kiu li tute ne havas rajton. Nur la kapablo, pere de kiu la objekto estas farita, rajtigas pagon. Al komerca varo, granda aŭ eta, estas do ligita ne nur pago por la kapablo, kiu estas natura valoro. Al tiu varo estas ligita ankaŭ prezo por io, kio laŭ kosma vidpunkto estas absolute senpaga. Tio signifas fakte, ke laŭ la plej altaj leĝoj de moralo la ekonomia mondo de la homaro estas komerca entrepreno de rabo kaj ricelo.

**La ekonomia situacio de la homaro estas ŝanĝebla nur per evoluo kaj ne per ia ajn formo de politiko aŭ diktaturo**

**19.** Estas evidente, ke tia neperfekta ekonomia sistemo akcelas militon kaj malfeliĉon, kaj povas kaŭzi terurajn juĝotagojn aŭ kataklismojn, povas kaŭzi vivabomenon kaj sinmortigon por homoj. Sistemo, kiu faras homojn mizeruloj kaj almozpetantoj, ŝtelistoj, rabistoj kaj fraŭdistoj, same kiel ĝi povas fari homojn ankaŭ orgojlaj kaj megalomaniaj, ne havas eblojn krei juston kaj pacon en la mondo. Sed ĉi tie ni denove memorigu pri tio, ke pro tiu sistemo neniu ajn estas riproĉinda. Ĝi estas esprimo de speciala evolustadio en la plano de Dio koncerne la kreadon

de la homo laŭ lia bildo (Gen. 1.26-27). La homoj ankoraŭ ne atingis tiujn humanan konduton kaj intelektan komprenon pri la kosma vivstrukturo, kiuj necesas, por ke ili povu sperti la kaŭzon de sia propra kataklismokrea ekonomia vivfundamento. Tial tiu nuntempa ekonomia sistemo de la homaro ne estas ŝanĝebla per ia ajn diktaturo aŭ per ia politika partio. La transformado de tiu sistemo necese okazu per evoluo. Tute per si mem tiu transformado okazas iom post iom per la spirita kreskado de la homoj. Tial en ĉiu stadio nenio ajn povas esti alispeca, ol ĝi ĝuste estas. Sed nenio restas senmova. Ĉio neperfekta evoluas kaj fariĝos perfekta aŭ finkreita. Kaj ankaŭ la neperfekteco de la homaro ŝanĝiĝos al perfekteco, kaj la homaro estos finkreita.

### La homa kreokapablo estas la sola absoluta valoro, kaj ĝi anstataŭos la monan sistemon

**20.** Kia estos la ekonomio de la homaro kiel fina rezulto? – Antaŭ ĉio oni komprenu, ke ĉio evoluos al internaciismo. Ĉiuj regnoj kaj ŝtatoj en la mondo unuiĝos en unu ŝtato aŭ unu regno kun komuna superaŭtoritata registaro. Tiam la homaro estos evoluinta al kompreno pri tio, ke neniu ajn homo havas rajton private posedi kaj monopoligi la naturvaloraĵojn de la tero, t.e. la karbo, oleo, metaloj kaj mineraloj en la tero, kaj ĉiuj aliaj vivgravaj naturproduktoj. Kiel antaŭe menciite, absolute ne kostis al iu homo ion ajn, ke tiuj naturvaloraĵoj troviĝas en la tero. Estas evidente, ke ili estas destinitaj kiel komuna posedaĵo por la tuta homaro. Per kio alia la vivaj estuloj povus evolui kaj konservi sian vivon? – Sed en si mem ĉiuj tiuj bonaĵoj de la naturo havas absolute neniun valoron. Ili fariĝas valoraj nur per la homa kapablo elpreni ilin kaj transformi ilin al utilo, ĝojo kaj beno por la homaro. Tiu tuta transformado de la materio de la naturo al tia bonaĵo por la homaro okazas ekskluzive per la homa kreokapablo. Ĉar laŭ kosma vidpunkto absolute ĉiuj homoj posedas tiujn materiojn kaj regionojn de la tero, kiujn ili havu por vivi, do nur la homa kreokapablo transformi tiujn materiojn al la konservado de iliaj ĉiutagaj vivo kaj ekzisto, estas la absolute unuaranga valorkvanto. Por la homo tiu kapablo estas do la absolute sola vera kunnaskita reala valoro. Kaj tial ĝi anstataŭos la monan sistemon.

### La labordivido, vivnivelo kaj vivpasporto de la monda ŝtato

**21.** Ĉiu sana kaj normale laborkapabla homo havas kunnaskitan labor- aŭ kreokapablon, kiu kune kun la kreokapabloj de aliaj homoj faras ilin kapablaj transformi la materion al fizika vivfundamento por la homaro. Pro tio la komplete perfekta ekonomia sistemo ekfunkcios. Laŭ tiu sistemo ĉiu homo devas mem liveri tiun nombron da laborhoroj, kiuj necesas por transformi la materion al vivfundamento por si mem. Tio estas do ekz.: nutraĵo, loĝejo, instruado, edukado, transporto, vojaĝado, malsanula helpo, prizorgo en la infanaĝo kaj en la maljunaĝo. – Kiel eblas krei tian situacion, en kiu la estulo mem liveras tiun nombron da laborhoroj, kiun kostas ĝia propra vivo de la naskiĝo ĝis la morto? – Ĉi tie oni komprenu, ke unue la monda ŝtato fariĝu realo. La registaro de tiu ŝtato, kiu konsistos el ĉiuj ŝtatoj en la mondo, respondecos pri la loĝantaro de la tuta tero. Per komputiloj kaj multaj aliaj similaj aparatoj, kiuj tiam ekzistos, ĝi kapablos scii kiom da laborhoroj necesos por krei por la tuta tera homaro tian kapaciton de vivnivelo, ke ĝi povos doni al ĉiu homo vivon en bonfarto kun rezultantaj feliĉo kaj ĝojo. La monda registaro scios, kiom da homoj ekzistos ĉiutempe. Laŭ tio ĝi kalkulos, kiom da

laborhoroj necesos por doni al la homaro la menciitan perfektan vivnivelon, kaj post tio ĝi povos disdividi tiujn laborhorojn al ĉiuj unuopaj normale sanaj kaj laborkapablaj homoj. Per tiu grandioza raciigo de ĉia laboro aŭ kreado en la mondo, ĉiu unuopa homo havos nur treege malgrandan labortempon, eble du horojn ĉiutage aŭ eble unu tagon semajne. Grandparte tiu laboro realiĝos per tiu amaso da maŝinoj kaj aparatoj, kiuj tiam estos inventitaj. Oni eĉ havos maŝinojn, kiuj povos produkti maŝinojn. Tiam ne plu ekzistos kruda manlaboro. Por fari tiun laboron la homoj nur direktos maŝinojn. Kiam homo estos laborinta siajn leĝodevajn du horojn, aŭ la alian nombron kiu eble estos la reala, tiam tio estos notita sur karto. Kaj tiu karto validos do kiel kvitanco por ĝia laboro liverita. Per tiu kvitanco ĝi havos aliron al ĉiuj bonaĵoj de la monda ŝtato en la kadro de tiu kalkulita vivnivelo, al kiu konformos la menciitaj laborhoroj. Se homo deziros bonaĵojn ekster la kalkulita vivnivelo, do ankaŭ tio estos ebla, sed en tia kazo la ekstraj laborhoroj, kiuj necesos por produkti la deziratajn bonaĵojn, estos aldonitaj al la jam leĝe devigitaj laborhoroj de tiu homo. Tiuj laborkartoj de la estuloj sekve donos aliron al la vivbonaĵoj, kaj de nun ni nomas tiujn kartojn: "vivpasportoj".

### La signifo de la forigo de mono en la monda ŝtato

**22.** En la monda ŝtato la menciita vivpasporto estos do komplete anstataŭinta la monan sistemon. Nenia ajn varo aŭ kreita objekto havos monan valoron. Tial ĝi ankaŭ ne povos fariĝi komerca varo, same kiel ankaŭ ĉia komerco estos ĉesinta. Neniu povos aĉeti aŭ vendi. Eblos nur ricevi kaj doni donacojn. Sed ja ankaŭ ne estos iu ajn en la monda ŝtato, kiu bezonos monon. Ĉiuj estos bonhavaj. Ĉiuj troviĝos en pli bonaj cirkonstancoj ol la ordinara bonhava homo en la nuna tempo. Kiam nenia ajn kreita objekto havos vendan valoron, kaj la homoj povos per siaj vivpasportoj ricevi ĉion deziratan, tiam la tiel nomataj krimoj, ŝtelo, fraŭdo, envio kaj similaj mallumaj pensklimatoj kaj agoj tute foriĝos. Kaj estiĝos lumo kaj ĝojo tie, kie antaŭe tiuj eraraj manifestaĵoj mallumigis la ĉiutagan vivon. Ĉiu homo do mem liveros tiujn laborhorojn, kiujn kostos ĝia vivo.
Tio validos ankaŭ por ĝiaj infanaĝo, maljunaĝo kaj ĝiaj eventualaj tagoj de malsano. En la perfekta homregno neniu homo povos vivi je la kosto de aliaj. La mallumaj pensklimatoj kun milito, kripligo, mankego kaj mizero, kiuj antaŭe manifestiĝis en la homaro, do foriĝos, kaj la dia lumo brilos tie.

### En la monda ŝtato ĉiuj laboros en sia hobio

**23.** La homa laborkapablo estos do la sola vera valoro de la monda ŝtato, kaj tial ĉiu infano ricevos edukon sur tiu kampo de laboro aŭ kreado, kie ĝi havos siajn kapablojn kaj talentojn, ĉar nur tie estos ĝia hobio aŭ vivemo kaj kreemo. Sekve, kie la estulo havos sian vivemon aŭ hobion, tie ĝiaj laŭdevaj laborhoroj, kiujn ĝi devos liveri por sia ekzisto, fariĝos vivĝojo kaj ne teda ruinigo de la vivemo. Tie, kie antaŭe ĝi pli aŭ malpli sentis la laboron sklaveco, ĝi tiam sentos grandajn inspiron kaj vivemon je granda ĝojo kaj por si mem kaj por siaj ĉirkaŭuloj, same kiel la kvalito de ĝia laboro multe superos tion, kion ĝi kapablis fari antaŭe.

### Ankaŭ infaneduko kaj profesia eduko okazos surbaze de vivpasporto

**24.** Ĉar ankaŭ infaneduko kaj profesia eduko okazos surbaze de vivpasportoj, do tio estos avantaĝo por la gepatroj. Ili povos eventuale mem uzi siajn

leĝodevajn laborhorojn por eduki siajn infanojn, aŭ ili povos igi specialistojn pri infaneduko transpreni tiun okupon. En la monda ŝtato sekve neniu povos vivi je kosto de aliaj. Eĉ ne infanoj estos ekonomie dependaj de siaj gepatroj. Do ne troviĝos en la monda ŝtato ia ajn falsa valoro. Neniu povos esti fraŭdita, neniu povos havi ŝuldojn, neniu povos ruiniĝi, neniu povos veni sub ekonomian devigon. La ekonomio de la monda ŝtato estos en sia natura stato. Ĝi estos aŭtomata lumfunkcio. Ĉiuj laboros en sia hobio kaj ĝuas sian vivon en ekonomia bonfarto. Ilia vivo ne estos ŝarĝo por aliaj, kaj aliaj ne estos ŝarĝo por ili. La monda ŝtato estos en ekonomia ekvilibro.

**Internacia mondlingvo**

**25.** Estas nature kaj klare, ke en la monda ŝtato aŭ internacia monda regno oni ne lame iros per naciaj lingvaj lambastonoj, per interpretistoj kaj pli aŭ malpli malbonaj tradukoj. La monda ŝtato kompreneble havos sian propran specialan internacian lingvon. Ĉiu unuopa infano en la lernejoj en la tuta mondo ricevos edukon en tiu internacia lingvo de la monda ŝtato. Imagu kia faciliĝo estos por la homoj de tiu tempo tute ne havi lingvajn barojn, senkonsidere kie ajn ili troviĝos sur la tero. Ĉiuj homoj en la mondo, de la sudo kaj la nordo, de la oriento kaj la okcidento, povos interparoli, povos interkompreniĝi. Per komuna lingvo la tuta mondo estos komuna patrolando por ĉiuj homoj sendepende de nacieco, kulturo kaj raso. Imagu kia faciliĝo aŭ laborŝparo, ke ne necesos traduki iajn ajn librojn aŭ skribaĵojn. Ĉiuj povos legi ĉion. Ke neniu el la ekzistantaj naciaj lingvoj estos uzata kiel tiu komuna lingvo, tio kompreneble estas tute certa. Neniu ajn el tiuj naciaj lingvoj estus uzebla sen eventuala estiĝo de ĵaluzo aŭ amaro, eble eĉ ankaŭ milito. Tial la mondo havos neŭtralan internacian lingvon. Kiam oni komencos instrui ĝin en ĉiuj lernejoj de la mondo, la infanoj, kiuj lernos ĝin, atingos la kapablon interparoli sendepende de nacieco kaj raso. Tio kontribuos al multe pli granda unuiĝo de la homoj en amikeco kaj paco, kaj daŭre pli altgrade faros ilin interligita frata popolo en la tuta mondo.

**La humaneco en la homo fariĝos la reganta faktoro en la monda ŝtato**

**26.** Krom la dia ekonomia transformo, ankaŭ la mensa stato de la homoj ŝanĝiĝos laŭ la tempo. Iom post iom ili venkos sian bestan naturon. Tial samgrade la humana naturo en la homo fariĝos la reganta faktoro. La humana naturo en la homo estas proksimula amo, saĝo, talentoj, kulminaj artaj manifestaĵoj de nobla speco ĝis nun nekonata sur la tero. Tio validas pri muziko, skulptado, pentrado kaj arta verkado. Ĉiuj noblaj talentoj de plej alta perfekteco sekve aktiviĝos en la perfekta homregno. La kaŭzo, ke tiel altgrade la fina homo manifestos ĉiujn tiujn perfektaĵojn, kompreneble estas la plene perfekta kapablo de proksimula amo, kiu efikos tie, kaj ankaŭ la rezultanta intuicikapablo. Sed tiu amo estas ja ligita al la mala poluso en la homo, kio plue signifas: al la maskla poluso en la virino kaj al la femala poluso en la viro. En sia evoluo la perfekta homo estas progresinta al la plene evoluinta polusa stadio, kaj tio signifas, ke ĝia mala poluso estas progresinta al la sama stadio kiel ĝia ordinara poluso. Ankaŭ la ordinara poluso, kiu ĝis nun reprezentis la bestajn dispoziciojn en la estulo kaj kaŭzis, ke ili estis la gvidaj, transformiĝis laŭ evoluo de la mala poluso, kiu reprezentas ĝuste la humanecon en la estulo. Kiam do pere de la evoluo tiuj du polusoj adaptiĝis al cent procenta kunlaboro en homa konscio komplete senigita je besta mensostato,

tiam la estulo fariĝis ĝuste komplete perfekta homo laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27). Tie ĝi fariĝis la perdita filo reveninta al sia patro.

### La dupoluseco de la komplete perfekta homo


**27.** En la fina homo laŭ la bildo de Dio ambaŭ polusoj, la maskla kaj la femala, estas ja egalnivelaj kaj troviĝas en ekvilibro, kaj tial la menciita estulo estas nek speciala "virseksulo" nek speciala "inseksulo". La fina homo laŭ la bildo de Dio (Gen. 1.26-27) estas do nek viro nek virino. Ĝi estas ĝuste la vera absoluta "homo". Kaj ĝuste tiu dupoluseco faras la estulon bildo de Dio. Tio, kio kreas la homon, estas do la dupoluseco. Ke ne okazas geedzecoj en socio de tiaj estuloj, kaj ke ne naskiĝas infanoj, tio estas memkomprenebla. Tie la plej alta fajro aŭ seksa principo ne havas eblojn realigi tiun instinktan unupolusan simpation, kiun ni konas kiel "enamiĝon", kaj kiu povas plene okupi la konscion de homo tiel, ke ĝi preskaŭ ne povas pensi pri io alia ol la objekto de tiu artefarita simpatio. Tiu sento de simpatio ne estas amo evoluinta per doloroj kaj suferoj, kiel estas la vera amo. Tial tiu sento diferencas de la vera amo per tio, ke ĝi celas nur unuopan specialan objekton, nome estulon de mala sekso, kaj kondiĉe ke tiu estulo povas reciproki tiun simpation per samaj forto kaj ago. En mala kazo la enamiĝo povas rezultigi malamon, mortigon aŭ la suferigan tiel nomatan "malfeliĉan amon", dum la vera natura amo estas bazita sur la principo *prefere doni ol preni*. Tiu vera amo ne povas rezultigi iun formon de enamiĝo aŭ avido posedi per potenco kaj perforto alian estulon tute por si mem. La enamiĝo aŭ artefarita simpatio kreas ja ĵaluzon kaj rivalecon, kiuj estas radiko de la mallumo aŭ malbono, sed vera amo kreas fundamenton por la bono aŭ lumo en la mondo. La amo estas travivado kaj manifestado de la unuaranga konscio de Dio. Tiuj travivado kaj manifestado kondukas la estulon antaŭen al kosma konscio kaj faros ĝin unu kun Dio.

## Klarigo pri simbolo n-ro 26

**28.** Simbolo n-ro 26 montras la venontan finan homaron de la terglobo. La flava suno en la mezo simbolas la komunan registaron de la tuta homaro. La rondaj blankaj figuroj kun la nigra sago montranta al la menciita suno aŭ komuna registaro, simbolas la diversajn naciojn aŭ ŝtatojn de la tero. Ili ĉiuj troviĝas en la radioj de la menciita suno. Tio signifas, ke ili estas submetitaj al tiu komuna registaro aŭ supera aŭtoritato. Ke la radioj estas flavaj kaj verdaj simbolas, ke la menciitaj ŝtatoj estos regataj per intelektigita sento, kiu estas la samo kiel proksimula amo. Tial tie ja ne povos troviĝi ia ajn formo de milito kaj mallumaj karmosuferoj. Ankaŭ malsato, mankego kaj malriĉo ne troviĝos tie. Tie neniu povos vivi je la kosto de aliaj, ĉar la homa kreokapablo estos la sola valorkvanto, per kiu oni povos akiri la vivtenadon.

**29.** La blua stelo meze en la flava suno simbolas, ke la monda registaro konsistos el kosme konsciaj estuloj. La blanka triangulo simbolas la eternan originon kaj veran Dion de la universo. La du eksteraj malsupreniraj oranĝkoloraj radioj simbolas tie, same kiel en la simboloj n-ro 24 kaj n-ro 25, la mallumajn kaj primitivajn mortigajn religiojn. Ni vidas en ĉi tiu simbolo, ke ili ne influos en la monda regno. Sammaniere la du flavaj radioj simbolas la humanajn religiojn de kredo, kiuj ankaŭ ne plu havos konsiderindan potencon en la monda regno. Aliflanke ni vidas, ke la granda blanka radio, kiu reprezentas la eternan veron, la solvon de la vivmistero en formo de scienco, tie estos superrega.

Reg. 26



*La venonta perfekta homregno*

© Martinus Institut 1981

Tie ĝi estos anstataŭinta ĉiujn religiajn sektojn kaj sociojn, ĉiujn nefinajn kaj primitivajn konceptojn pri Dio kaj la vivo.

**30.** Koncerne la komplete finan homon laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27), ĝi estos, kiel jam tuŝite, estulo komplete liberigita de ĉia besta naturo. Ĝi estos estulo transformita de mambesto al la menciita komplete perfekta homo. De vivado en la duaranga aŭ besta formo de la plej alta fajro, ĝi estos transformita por vivi en la unuaranga aŭ pure homa formo de la sama plej alta fajro. La plej alta fajro en sia besta formo estas, kiel menciite, realigata per la unupoluseco. Ĝi estas organa strukturo, kiu vivkondiĉas la jenon por la estulo: *prefere preni ol doni*. Tial por ekzisti la estulo devas vivi en batalo kaj milito. Per siaj pariĝa instinkto kaj genera proceso, kaj per la kunnaskita inklino protekti la idojn, ĝi komencas sperti la proceson vivi – ne nur por si mem, sed ankaŭ por idoj kaj familio. Same kiel la inklino senti simpation al idoj kaj familio estiĝis pro la unupoluseco de la estulo, tiel estiĝos laŭ ĝia transiro al dupoluseco la inklino ami ĉiujn aŭ sian proksimulon kiel sin mem. Sen tiu plej alta formo de amo neniu estulo povus iam ajn liberiĝi de la besta regno kaj fariĝi la homo laŭ la bildo de Dio simila al li. Krom esti unuarange unupolusaj, senescepte ĉiuj homoj estas ankaŭ dupolusaj. Sed ĉe la plej granda parto de la homaro tiu dupoluseco estas ankoraŭ tiel malmulte evoluinta, ke ordinare la homoj ankoraŭ ne scias tion. Ja eĉ ne tiuj homoj, kiuj estas plej progresintaj en tiu evoluo, komprenas tiun sian situacion. Kutime ĝi estas konsiderata kiel abnorma stato. Ke tiu erara prijuĝo aŭ erara opinio estis kaj ankoraŭ grandskale estas teruro kaj ĝeno por la estuloj progresintaj en tiu evoluo, tio estas memkomprenebla. Tio kaŭzis, ke sur tiu kampo de evoluo kreiĝis teruraj devojiĝoj kun tre malbonaj efikoj por la socio kaj por tiuj estuloj mem. Malrespekti, moki kaj puni tiujn estulojn estas la samo kiel saboti la evoluon. Tio estas kreado de psikaj aŭ animaj invalidoj aŭ kripluloj. – Ĉi tie ni ne povas pli detale trakti tiujn analizojn, sed en postaj simbolklarigoj ni pli detale prilumos tiun specialan regionon de polusa evoluo. Tamen finfine ni menciu, ke la dupoluseco kondukos la homojn antaŭen al liberiĝo de tio, ke ili naskiĝu de virinoj. Ĉe la fina homo samtempe estos evoluinta kapablo, per kiu ĝi povos materiigi sin, kio signifas, ke sub certaj kondiĉoj ĝi povos krei al si provizoran fizikan korpon, en kiu dum mallonga tempo ĝi povos esti fizika kaj povos paroli kun la fizikaj homoj. Poste ĝi povos ree per nemateriigo fulmrapide dissolvi la provizoran korpon kaj denove esti malaperinta el la fizika sfero. Ke tiu kapablo kreos viglan kuneston inter la "mortintoj" kaj la "vivantoj", kio signifas inter la spiritaj aŭ elkarniĝintaj estuloj kaj la enkarniĝintaj estuloj, tio estas tute natura. Por tiuj estuloj la morto sekve ne disigos la spiritajn estulojn de la fizikaj estuloj. Tial en la monda ŝtato ankaŭ ne okazos iuj ceremonioj de entombigo aŭ funebro. Ĉio estos trafluata de lumo kaj ĝojo.

### La nobla vivo en la monda ŝtato

**31.** En la monda ŝtato troviĝos neniaj ajn politikaj bataloj, ĉar la monda politiko estos kulmino de la plej alta perfekteco aŭ proksimula amo. Tiun politikon direktos kosme konsciaj estuloj. Tiuj estos ja moralaj geniuloj kaj permesos nur tion, ke absolute ĉiuj homoj havu la saman aliron al la vivnivelo de la monda ŝtato, kiu vivnivelo estos konservata en la plej alta kapacito, kiu entute eblos. Tie antaŭ longe ĉesis ekzisti ĉia grandpotenca influo kun subpremaj tendencoj. Tie necesos nek plimulto nek

balotrajto, ĉar la regoformo de la monda ŝtato estos kulmina proksimula amo en kontakto kun la baza tono de la universo, kaj sekve estos plenumo de la volo de Dio. Tie ĉiuj vivos en sia hobio. Ili povos fari, kion ili volos ekster la devigitaj laborhoroj, kiujn kostos ilia vivo. La materialo por kreo de ĉiu ajn objekto estos senpaga. Tie ĉiuj prefere donos ol prenos. Tie neniu povos aĉeti aŭ vendi, ĉar antaŭ longe la komerca principo ĉesis ekzisti. Kaj ĉiuj estos pli aŭ malpli evoluintaj sciencistoj, artistoj, verkistoj kaj poetoj. Ordinara kruda laboro ne ekzistos, ĉar ĉio estos farata pli aŭ malpli per aŭtomatigitaj aparatoj kaj maŝinoj. Ankaŭ ne troviĝos en la monda ŝtato tiu tuta medio de lacaj homoj malfortigitaj kaj tro frue maljunigitaj de kruda penega laboro. Ĉiuj estos edukitaj kaj intelektaj estuloj, kiuj ne konos malriĉon aŭ ekonomiajn malfacilaĵojn, ĉar la mona sistemo ne plu ekzistos. Tie ne troviĝos sindikatoj aŭ batalo pri salajro. Tie ne troviĝos labordonantoj kaj ne laboristoj submetitaj al ili. Tie neniuj devos perlabori monon por aliaj. Tie la ĉiutaga pano kostos nenian ajn batalon, tie neniuj devos riĉiĝi. Ĉiu homo tie laboros absolute nur por sia propra vivtenado, kaj absolute ne por konservi la vivon de aliaj, kiuj vivos en senlaboreco aŭ maldiligenteco. Per siaj kapabloj ĉiu estulo mem laboros tiun nombron da horoj, kiu konformos al tiu, kiun kostos ĝia propra vivtenado sur la kalkulita alta vivnivelo fiksita de la monda registaro. Tie neniuj homoj estos tiel malmulte evoluintaj, ke ili povos instigi al malpaco kaj milito. Tial ankaŭ ne ekzistos bezono por nervoklinikoj kaj hospitaloj por mensaj malsanuloj. Same la ceteraj malsanulejoj kaj hospitaloj estos en forta reduktiĝo, se entute ili troviĝos – ne nur pro la feliĉaj fizikaj cirkonstancoj, en kiuj la homoj troviĝos, sed ankaŭ altgrade pro la konstantaj simpatio kaj amo, kiujn ĉiuj disradios al ĉiuj. En tiu perfekta homregno kompreneble ne okazos mortpuno aŭ ia ajn alia formo de puno, ĉar ne troviĝos "krimuloj". Kaj tiu amo al la bestoj, kiu estos kaŭzinta, ke en la monda ŝtato oni neniel uzos animalan nutraĵon, sed konsideros ĝin same, kiel nuntempe oni konsideras kanibalismon, kaj ke same oni ne vestos sin per bestaj haŭtoj aŭ feloj, tio estos liberiginta la homojn el grandega oceano da karmo. Imagu kian dian vivon en kiu vivi. Ne estas strange, ke necesas fina homevoluo por esti en tia regno, kiu estos ĝuste la vera "regno de Dio" sur la tero. Envere la disvastigo de "la parakleto, la sankta spirito" (Joh. 14.26), estos plenumita tie. La terglobo estos iĝinta la homregno laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27). La amo de Dio lumos kaj varmigos de ĉiuj okuloj, de ĉiuj mensoj kaj de ĉiuj koroj. La vivo estos iĝinta mondo de karesoj. Ni estos en la ĉiela regno. Kaj tio estos la venonta donaco de Dio al la homaro.

Ĉi tie ni finas nian analizon de la internacia mondregno, en kiu la homaro de la tero estos unuigita. Tio okazas per du citaĵoj el mia ĉefverko "Livets Bog", (La Libro de la Vivo), en kiu tiu temo estas detale traktita. La citaĵoj troviĝas en la paragrafoj 117-119. Interalie tiuj citaĵoj esprimas la dek du ĉefajn punktojn, kiuj konsistigas la firman portantan fundamenton por la strukturo de la mondregno en kontakto kun la baza tono de la universo, la amo.

1. Ĉiuj formoj de venko de la altruismo super la egoismo (la venko de la komunintereso super la privatintereso).
2. Kreo de internacia demokrata monda registaro.
3. Malarmado de ĉiuj landoj favore al establo de internacia senpartia mondpolico.

4. Evoluigo de internacia malkaŝa – ne sekreta – plej alta leĝodona organo kaj justico reprezentanta la plej elstarajn estulojn de la scienco en spiritaj kiel ankaŭ en materiaj regionoj, estuloj, kiuj havos la necesajn kvalifikojn por distingi inter “abnormaj agoj” kaj “krimoj”, kiuj havos scion pri la proceso de la evoluo kaj pri la eternaj leĝoj de la vivo, kaj kiuj per tio povos esti garantio pri absolutaj rajto kaj justo por ĉio kaj ĉiuj.
5. Forigo de privata posedo de la naturvalorajoj favore al proprigo de ili al la monda ŝtato.
6. Forigo de mono favore al enkonduko de persone farita laboro kiel sola pagvaloro, kaj ties kvitanco kiel sola persona pagilo.
7. Establo de infana, maljunula kaj malsanula fonduso komuna por la tuta monda ŝtato surbaze de partopagoj per laborkvitancoj.
8. Utiligo de maŝinoj por malplilongigi materian labortempon favore al studotagoj kaj spirita esplorado.
9. Forigo de perforta politiko kaj sangelverŝoj.
10. Forigo de punoj per torturo kaj mortigado favore al kleraj aranĝoj de internigo kaj edukado
11. Evoluigo de vegetaraj nutraĵoj, de sano kaj korpoflegado, de sanaj kaj helaj loĝocirkonstancoj.
12. Evoluigo de spirita libero, toleremo, humaneco kaj amo al ĉiuj vivaj estuloj, al homoj kaj bestoj, al plantoj kaj mineraloj.

Tiuj dek du punktoj identas do kun tiuj realaĵoj, ĉirkaŭ kiuj koncentriĝos la tuta terhoma evoluenergio. Sub tiuj punktoj plenumo de la plej alta amordono de la vivo, “amu unu la alian” (Joh. 15.12), do en la ĉiutaga vivo de la tera homo kaj surbaze de la nova kosma mondimpulso celos al sia perfekta realiĝo. La menciitaj punktoj sekve ne estas kreitaj cerbumaĵoj aŭ starigita hipotezo, sed male estas esprimoj de reala analizo de faktoj, kiuj estiĝis nur surbaze de antaŭaj realaj travivaĵoj. Tial neniu tera homo povos ekzisti sen kontakto kun tiuj realaĵoj aŭ ĉirkaŭita de tiuj energioj.

Esti en harmonio kun tiuj energioj aŭ kun la menciitaj dek du punktoj estos do la samo kiel esti en harmonio kun la dia mondplano. – Tio signifas: esti stimula faktoro en la kreado de la monda paco sur la tero, kaj tio estas la plej rapida vojo por ĉiu tera homo al “la granda naskiĝo” aŭ atingo de iluminita vivo.

La grandaj eventoj, kiuj tiel trairas la mondon en ĉi tiu jarcento, identas do kun la transformado de la nebula stato de la tera homaro al sune luma vivo. – Tio estas mortobatalo de la besta regno en la terhoma socikorpo. Tio estas estiĝo de la komenciĝanta kosma homa regno sur la tero. Ke tiuj grandiozaj eventoj ne povis kaj ne povos okazi tute sensange, tio estas tute natura fenomeno tiel longe, kiel ili ankoraŭ identas kun batalo okazanta en regiono, kie malamo, venĝo kaj sindefendo batalas kontraŭ sklaveco, akaparo kaj monavidego. Batalejo, kiu prezentas reagon inter tiaj energioj, povas rezultigi nur kadavrojn. Sed kontraste al tiuj kadavroj la mondo estiĝos en nova iluminita formo, kaj la tero fariĝos vibrado de prudento kaj amo, harmonio de intuicio kaj beato.

Symbol n-ro 26 “La venonta perfekta homregno” estas eltiro de *La Eterna Mondbildo* 2.

# Mencioj de Esperanto en Granda Kurso

**Naciaj kaj internaciaj lingvoj – Esperanto**

**492.** En la Biblio ni povas legi, ke iam estis neceso, ke la lingvoj malsimilu. [Babela Turo]. La malmultaj homoj sur la tero tiutempe tendencis kolektiĝi kaj grupiĝi, kaj la resto de la mondo senhomiĝis. La lingvo ne subite ŝanĝiĝis, sed la evoluo mem disvastigis la homojn. Dum ili vivis en specialaj grupoj for de aliaj grupoj, ili akiris siajn proprajn spertojn kaj ideojn, sian esprimmanieron kaj propran lingvon. Tiel multaj diversaj lingvoj aperis, kaj tio kaŭzis la fortigon de naciismo.

Sed nun por multaj homoj malfacilas ne povi paroli fremdajn lingvojn, kaj ili devas multe uzi la plej grandajn kaj disvastigitajn naciajn lingvojn. Sed tio ne sufiĉas. Ni vidas ke estas tendencoj evoluigi aliajn lingvojn, lingvojn kiuj ne estas naciaj lingvoj, sed internaciaj lingvoj.

Ni vidis idealiston krei mondlingvon, *Esperanto*, kiu ludos treege gravan rolon, *ĉar ĝi estas kreita laŭ la diaj principoj,* ĉar ĝi estas logika, kaj ĉar ĝi estas facile lernebla. Tio ankaŭ estas io kio indikas ke venos alia ekzisto. (Martinus, *Granda Kurso, La eterna mondbildo*, par. 492).


**En la nuna vivo oni povas komenci konstruadon de la venonta vivo**

**283.** Tiam, kiam la homoj komprenos, ke oni vivas plurajn vivojn, kaj ke multaj okazantaj eventoj hodiaŭ en nia sorto estas io, kio okazaj pro niaj pasintaj animalaj spertoj, tiam ili komencas zorgi pri estontaj vivoj kaj organizi kaj aranĝi sian nunan vivon laŭ tio. Mi scias pri maljunulo, kiu estis proksima al 90 jaroj, kiam li eklernis *Esperanton*. Li diris, "jes, oni ĉiam povas akiri kelkajn talentkernojn pri tiu lingvo". Kaj li pravas. Li neniam farus tion, se li estus tiel religema, ke li kredus, ke oni neniam revenos en la fizikan mondon. Religema homo pensus, ke en la ĉielo oni ne bezonus *Esperanton*, kion ni kompreneble ne bezonas.

Jen tio tiel vigligos homojn ŝanĝi sian vivon, kaj tio ja tre bonas. Pensu, vi povas komenci konstrui vian estontan vivon hodiaŭ! – Ĝuste kiel la inĝenieroj konstruas diversajn aferojn, do vi povas komenci konstrui vian vivon kaj decidi vian sorton, se vi nur akiros tiun inĝenieran scion, sur kiuj baziĝas feliĉa sorto. Sed feliĉa sorto povas nur baziĝi sur perfekta konduto. Kiam homo havas kompletan scion pri aliaj homoj, ĝi scias, kial ili estas kiel ili estas, kaj ke ili devas esti, kiel ili estas. Oni scias, ke tio estas io, kion oni ne povas ŝanĝi, sed tio estas io, pri kio oni devas esti atentema kaj singardema. (Martinus, *Granda Kurso, La eterna mondbildo*, par. 283).

Traduko Ole Therkelsen

# Esperanto kiel oficiala internacia lingvo de Martinus Instituto



*Martinus*

En sia kunveno la 5-an de aprilo 1965 la konsilio unuanime decidis, ke Esperanto estu la oficiala internacia lingvo de Martinus Instituto kaj de ties internacia organizo, kiun oni planis starigi. Kune kun tiu decido oni faris la jenan deklaron:

Estas fakto, ke niatempe la homaro troviĝas en daŭre progresanta evoluo al tiu internaciismo, en kiu partopreno fariĝos vivkondiĉo por ĉiu ŝtato kaj por ĉiu unuopa homo.

Tiu evoluo kondukas al multaj formoj de forta iniciato por progresigi ĉiujn specojn de komune homaj kaj humanismaj aktivecoj, al kiuj apartenas ankaŭ laborado por la internacia lingvo

Ni estas plene konvinkitaj pri la neebleco de elekto de nacia lingvo por tiu internacia pozicio. Pro la malfacilaĵoj kaj ceteraj malavantaĝoj pri elekto de nacia lingvo, ni same estas tute konvinkitaj, kaj laŭ vidpunkto de la tuta homaro tia elekto ne estus sufiĉe praktika. Tial ĝi estus ankaŭ nedezirinda solvo, ĉar troviĝas iu pli efika.

La oficialaj, dokumentitaj faktoj pri Esperanto, la agnosko de ĝi flanke de gravaj oficialaj instancoj, ĝia facileco, ĝiaj fleksemo kaj esprimkapaploj, kaj krome ankaŭ la praktikaj rezultoj atingitaj per ĝi, montras superan probablecon de ĝia elekto kiel fina mondlingvo.

Ankaŭ la multjaraj spertoj de la laboro de nia Instituto montras la superan taŭgecon de Esperanto, ne nur kiel unu el la lingvoj por la laboro, sed ankaŭ kiel sekura ponta lingvo al eĉ la plej grandaj naciaj lingvoj.

Sendepende de la sinteno de la cetera mondo al la internacia lingvoproblemo, Esperanto estas ilo kvazaŭ kreita por la celoj de la Instituto, por gvidado kaj aministrado

de ĝia internacia organizo, kaj grandskale ankaŭ por ĝisfunda komunikado kun eksterlandaj interesuloj, eble precipe de foraj lingvoj.

Tio tamen ne signifas, ke la naciaj lingvoj estu flankenŝovitaj, aŭ ke ili havu malgravan signifon. Tute kontraŭe! – Absolute memkomprenebla afero estas, ke ankaŭ ĉiu ajn nacia lingvo estu uzata ĉie, kie tio estas utila kaj celtaŭga. Estas eĉ tiel, ke ankaŭ pere de Esperanto okazu tre forta iniciato por krei tiel multajn, tiel ampleksajn kaj efikajn aktivecojn, kiel entute povas okazi en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj. La decido pri Esperanto kiel la ofciala internacia lingvo ankaŭ estas decido bazita sur praktikaj kaŭzoj por meti ĝin en centran pozicion rilate al la eksterlandaj aktivecoj.


La decido krome signifas fortan instigon al ĉiuj interesuloj mem laŭeble lerni la lingvon kaj per tio grandigi ĝian utilon por aliaj. Ĝi estas forta instigo anakŭ al ĉia ebla apogo al la klopodoj de aliaj por ankaŭ tiel vastigi ĝian utilon por la celoj de la Instituto kaj al la ĝenerala, interhoma progresigado de la monda kulturo."

Kopenhago la 5-an de aprilo 1965

Martinus — Henning Laug
Tage Edeling — Ib Schleicher

[Konsilia protokolo 05.04.1965. Vidu ankaŭ La kunlabora strukturo, par. 6.4].

## Martinus pri Esperanto en 1974




*En konsilia kunsido en la Instituto de Martinus la 30-an de aprilo 1974 Martinus diris:*

"Mi kredas ke ni estas iom fruaj pri Esperanto, sed cetere ĝi estas bonega afero. Ĝi venos iam, kaj tio estas grandioza. Estus bone, se okazas rapide.

Sed estos Esperanto. Kiu alia povus esti? Ĉu estas aliaj lingvoj pli progresintaj?

Estas neniu lingvo same humana. Oni devas rigardi la kreinton. Li ja estis kolose humana viro. Oni preskaŭ povas vidi ke li estis taskita fari ĝin."

(*Samarbejdsstrukturen, La kunlabora strukturo*, par. 6.4).

# Finevoluinta kaj perfekta internacia lingvo

La litera alfabeto enhavas 28 literojn, dum la cifera alfabeto enhavas nur 10 nombroliterojn. Martinus skribas en sia ĉefverko *Livets Bog* ke same kiel la homo evoluigis ĝis perfekteco la nombrosistemon, tiel ankaŭ la litera lingvo grade evoluos atingonte similan perfektecon. (*Livets Bog* 3 par. 1017-1051).

La homo iĝos kapabla uzi la literan lingvon en maniero same perfekta kiel ĝi nun uzas la ciferan alfabeton. Tion oni neniam ajn sukcesos per la ekzistantaj naciaj lingvoj, kiuj ĉiuj estas plenaj de malregulaĵoj kaj aliaj nelogikaj fenomenoj, kiujn oni ne povas per la matematika logiko libere kaj kree kombini al novaj sencoportaj elementoj. La lingvo perfekta devas esti planlingvo, dekomence tiel konstruita ke ĝi estas tute liberigita pri malregulaĵoj kaj maladekvataj kutimoj kaj tradicioj. Ĝi devas enhavi aron da lingvaj elementoj kun prefiksoj kaj sufiksoj, kombineblaj tiamaniere ke oni povas esprimi precize tion kion oni deziras.

*Esperanto* estas tia lingvo, kiu pro sia perfekte logika kaj matematika strukturo plenumas tiujn postulojn kiujn oni povus fari pri la perfekta lingvo.


Lau kosma vidpunkto *Esperanto* estas perfekta lingvo. Surfone de tiuj genieco, humaneco kaj amo al la proksimulo, kiuj subkuŝas en la kreo de *Esperanto*, tre kortuŝe estas legi la finajn vortojn de *Livets Bog* 3:

*"Kiam la amo al la proksimulo povas instigi estulon kunmeti la alfabeton de la lingvo en tiajn vortojn kaj frazojn ke ili same kiel la strukturo de la cifera sistemo estigas la analizon de la universo kaj sekve de la vivo, tiam la eterna voĉo de la Diulo mem sonas senbare el ĝiaj lipoj. Tiam ĝi estas levita super la tempon kaj la spacon. Tiam ĝi harmoniiĝis kun la senfineco, la eterno kaj la ĉiopovo. Tiam ĝi estas 'la vojo, la vero kaj la vivo'."* (Citaĵo de *Livets Bog* 3, par. 1051)

**Esperantistoj estas denaskaj idealistoj**

Laŭ Martinus la esperantistoj estas denaskaj idealistoj, ĉar li estis konvinkita ke la plimulto de la tutmondaj esperantistoj estas homoj al kiuj veraj toleremo kaj internacia sinteno estas io kunnaskita. (Erik Gerner Larsson, *Kosmos* n-ro 1/1939, paĝo 8).

*Ole Therkelsen*



© Martinus Institut 1981 Reg. 42


*La Strukturo de la flago*

# DEMANDO KAJ RESPONDO

Demando: “Ni ja iam parolos la saman lingvon en la mondo. Kiu lingvo estos tiu?”

Martinus respondas:
“Esperanto! – Tiun ni parolos. Ne estas pro tio ke mi estas esperantisto, aŭ ke ĝi estas moda, sed ĉiam pli necesos ke ni havu komunan lingvon. Imagu se oni hodiaŭ havus komunan lingvon! – Tiam oni estus libera pri ĉiuj tiuj tradukoj. Ĉiuj libroj devas esti tradukataj, malofte okazas ke ili gajnas per la tradukado. Tre ofte okazas ke ili iom perdas pro la tradukado. Imagu kiom oni ŝparadus sciante unu saman lingvon. Ĉie ajn homoj povus interparoli. Tio ankaŭ kreus pacon. Nun la militaj pensoj estas grandparte kaŭzataj de tio ke oni ne povas interparoli. La interrilatado kaj la evoluo de amo estos plifaciligitaj kiam ĉiuj povos tute flue interparoli.” (Demanda leciono, Jönköping la 14-an de majo 1969).

**Martinus pri internacia mondlingvo:**
Vidu paĝon 25, par. 25 “Internacia mondlingvo”



*La esperanta flago*

Pro manko de laborforto en la esperanta sekcio ni portempe ĉesas la eldonadon de Eo-Kosmos.

Legu pri la Kosmologio de Martinus en Esperanto ĉe www.martinus.dk.

La Eo-adreseo de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk

INFORMO PRI
LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento. La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen.
Kompostado: Jan Tarbensen.
La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.

# LIBROJ EN ESPERANTO

La libroj de Martinus verkaro **La Tria Testamento** estas tradukitaj en la albana, angla, ĉeĥa, ĉina, franca, germana, hispana, hungara, islanda, itala, japana, kroata, litova, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, serba, sveda lingvo kaj Esperanto. –

**Livets Bog 1**

**La Eterna Mondbildo 1-4** – Libroj kiuj klarigas la simbolojn de Martinus

**Logiko**

**Sepulto**

La libretoj:

1. **La sorto de la homaro** – Pri la principoj laŭ kiuj evoluas la homaro.
2. **Pasko** – La mondhistoria pasko-evento estas analizita tiel, ke ĝi klare reliefiĝas.
3. **Kio estas la vero?** – Kun tiu fama demando kiel elirpunkto la libro montras, ke estas grave kompreni la veron de la vivo kaj akiri realan scion pri ĝi.
4. **Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio** – Tio kio instigis Martinus verki kaj la praktikaj sekvoj.
5. **La ideala nutraĵo** – La homa nutromaniero evoluas en direkto al malpli da mortigado kaj pli da humaneco.
6. **Folioj el la bildolibro de Dio** – Poezia verko, en kiu i.a. amplena priskribo de tansiro inter tago kaj nokto bele ilustras la idealan manieron de renkontiĝo inter du homoj.
7. **La idolo plej longe vivanta** – Ĝia temo estas la limigita vivkoncepto de la nuntempa homaro, kaj la grandiozo de la ĉirkaŭa naturo. La idolo plej longe vivanta estas la homo mem.
8. **La homaro kaj la mondbildo** – Traktas la homan vivon laŭ novaj vidpunktoj kaj ĵetas lumon sur malnovajn kaj novajn problemojn.
9. **Inter du mondepokoj** – Traktado de tiu tansira situacio inter primitiveco kaj humanisma vivoformo, en kiu vivas la nuntempa homaro.
10. **Kosma konscio** – Mensa suvereneco.
11. **La mistero de la preĝo** – Klariĝas la preĝon Patro Nia kaj kiel preĝado povas esti scienco.
12. **La vojo al iniciĝo** – Ĉirkaŭ miaj kosmaj analizoj. – Donacokulturo.
13. **La kristnaska evangelio** – Pri Jesuo kaj la evoluo de la homarao.